

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

# Zagreba Esperantisto

Ĉi-numere legu pri:

**SKANDALA PROPONO DE  
LA ELEKTA KOMISIONO DE UEA**

**JARKUNVENO DE KROATA ESPERANTO-LIGO**

**RAPORTO EL IFEF-KONGRESO**

**FUNDAMENTA SUKCESO EN  
SENDRATA TRANSMISIO DE ENERGIO**

**"SKLAVOJ DE DIO" EN KROATA  
TRADUKO**

2

2007

Monumento al banuso Jelacić en Zagrebo

Josip Pleadin

**Eldonanto:**

*Grafokom, Đurđevac*

**Ĉefa kaj respondeca  
redaktoro:**

*Radenko Milošević  
Goljak 43, HR-10000 Zagreb  
Kroatio*

**Redaktejo kaj ekspedejo:**

*Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr*

**Redakcianoj:**

*Marica Brletić, Snježana  
Habulin, Vida Jerman, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Ple-  
adin*

**Presis:**

*Grafokom, Đurđevac*

**Aperritmo:**

Ĉiun duan monaton (janu-  
aro, marto, majo, julio, sep-  
tembro kaj novembro). En  
2007 aperos kvar numeroj.

**Jarabono por 2007:**

**en Kroatio:** 50,00 kunaĵoj  
al ĝirkonto de "Grafokom"  
2360000-1100925404

**alilande:** 10,00 eŭroj  
al UEA-konto: plea-k

**Viajn tekstojn** sendu al  
nia retadreso ĉi-sube, aŭ  
al la persona adreso de la  
redaktoro.

## RESUMO

La unua numero de ZE ne lasis vin indiferentaj. Pluraj reagoj, ĉefe pozitivaj, venis al nia adreso. Sed, inter ili iomete ŝvebas la kaŝita demando, kial oni bezonas ZEL kaj ĝian gazeton? Je tiuj demandoj ni respondu mallonge: ZEL ne estas konkurenco, sed kunaganto. Tiu deziro miksiĝas kun deziro pri aktiva partopreno en la enlanda kaj internacia movadoj, pri bona informiteco de la landa esperantistaro kaj pri diskonigendaj informoj al eksterlandaj legantoj.

Senpere antaŭ la finredakto de ĉi-tiu numero, ni eksciis pri kandidatigo de Marija Belošević por estrarano de UEA. Tiu ekscio forte incitis la kroatan esperantistaron, kaj tra la reto komencis cirkuli diskutoj, kiuj anoncas potencialan krizon al UEA. Legu pri la kialoj en la ĉi-numeraj artikoloj.

Multe da spaco ni dediĉis al niaj aktivuloj, al homoj kiuj pacience kaj formike laboras por bono de Esperanto, sed pri kiuj ni malofte scias. Tia redakta politiko ankaŭ daŭre restos en ZE.

Esperanto estas ne nur lingvo por inter-esperantista kunlaboro. Ni volas prezenti ankaŭ tekstojn, kiuj ne tute rilatas al Esperanto, sed estas interesaj, aktulaj kaj legindaj. Influis nian starpunkton la konstato, ke Esperanto estas la sola lingvo en kiu 99-procente oni verkas ekskluzive pri Esperanto mem. Necesas ŝanĝi tiun rekordon kaj montri al la publiko, ke en Esperanto oni povas verki kaj publikigi ankaŭ pri tute aliaj, ĉiutagaj temoj, sciencaj kaj aliaj aferoj.

Aro da movadaj informoj plej freŝaj el vidpunkto de Esperanta preso, troviĝas ankaŭ en ĉi-tiu numero de ZE. Ili servu por alporti la "kolorojn" de nia movado ankaŭ al manoj de tiuj niaj samideanoj, kiuj neregule ricevas aliajn gazetojn kaj kiuj ne povas uzi Interreton. Tiaj estas multaj, ĉar la Movado apartenas al "maljungegeneraciaj", kiuj tute prave ne ofte uzas la modernajn teknologiojn, sed ĝuas Esperanton en sia origina, skriba kaj presa formo.

Pro abundeco de materialo por ĉi tiu numero, ni devis decidi ĉu redukti la enhavon al la promesitaj 24 paĝoj, aŭ aldoni kromajn paĝojn. Venkis la dua elekto, kaj nun vi havas en la manoj "senpagajn" ok paĝojn. Post aperigo de la demando en la unua numero pri la plej aĝaj esperantistoj en Kroatio, ni trovis pli ol 30 personojn, kiuj aĝas pli ol 80 jarojn. Mirinde, ĉar multaj el ili ankoraŭ aktivus en la Movado.

Kvankam antaŭ ni troviĝas ferioj kaj somero, la redakcianoj jam ŝvitas pri la tria numero, aperonta en septembro. Ĝis la aŭtuno, restu sanaj, gajaj kaj multe esperantumu. Pri viaj travivaĵoj raportu al ZE.

*La redaktoro*

**Retadreso: zagreba.esperantisto@gmail.com**

# MARIJA BELOŠEVIĆ - ESTRARANO DE UEA?

✍ Redakcia kompilo

Meze de junio, "Libera folio" (sendependa reta movada bulteno), cetere konata pro trafaj, ĝustatempaj kaj kompreneblaj komentoj de movadaj temoj, aperigis la tekston "Propono pri estraro revivigas kroatian skismon", kiu en sia enkonduko mallonge klarigas: *"La propono de la elekta komisiono, ke Marija Belošević el Kroatio iĝu estrarano de UEA kun speciala respondeco pri servoj al "naciaj asocioj" kaŭzis iriton speciale en Kroatio. Ŝi komence de la 1990-aj jaroj fondis kaj plu gvidas asocion, konkurantan kun la oficiala landa asocio de UEA en Kroatio. Spomenka Ŝtimec, la reprezentanto de Kroatio en la komitato de UEA, atentigis, ke Marija Belošević tute ne membras en la landa asocio de UEA en Kroatio kaj malutilas al la agado de la asocio. Edvige Tantin Ackermann, ano de la elekta komisiono, replikis, ke UEA ne bezonas la permeson de landaj asocioj kiam ĝi elektas estraranojn."*

Post lanĉo de informo pri protestoj de kroataj esperantistoj rilate la proponon de la elekta komisiono, en la diskutgrupo [komitato-de-uea@yahogroups.com](mailto:komitato-de-uea@yahogroups.com) okazis vigla diskuto de la komitatanoj de UEA, al kiuj estis sendita listo de kandidatoj por la estraro, kaj kiuj, finfine, devos voĉdoni kaj tiamaniere decidi pri la konsisto de la estraro dum la ĉi-jara UK en Jokohamo. La diskuton aparte elvokis reago de Spomenka Ŝtimec (vidu la tekston aldone), kiu donis privatan opinionon, ĉar Kroata Esperanto-Ligo ankoraŭ ne diskutis pri la problemo.

En sia longa kaj detala letero reagis Edvige Tantin Ackermann, kiu, laŭ bone informitaj fontoj, kaŭzis la tutan "aferaĉon". Ŝi skribis jene: "La fakto ke Belošević ne estas membro de KEL havas nenian gravecon. Mi supozas ke en Kroatio, ek de iom da tempo, ne estas devige aparteni al iu difinita organizo. Verŝajne ni ĉiuj membriĝas en asocio, loka grupo aŭ simile, laŭ nia propra volo, emo kaj deziro. Same pri fondo de organizo: ankaŭ en tiu ĉi kazo, mi supozas ke en Kroatio oni povas tion tute libere fari. Ĉu tio plaĉas aŭ ne al KEL kaj al Spomenka Ŝtimec. Oni rimarkis ke Belošević ne kontribuas al

harmonia agado pri Esperanto en Kroatio. Ĉu???? Mi neniam legis/aŭdis atakojn de Belošević al KEL, aŭ al ĝiaj membroj. Sed mi legis/aŭdis plurfoje atakojn de KEL aŭ de ĝiaj membroj al Belošević. Cetere, Belošević neniam reagis al tiuj atakoj, kio estis grava eraro. Kiamaniere taksu la mesaĝon de Ŝtimec, kaj la plusendon al la Komitato de la "plendoj" de aliaj du kroatoj? Ĉu ili kuraĝigas aŭ ĉu ili kontribuas al harmonia agado en Kroatio? La agadmaniero de Belošević kaŭzis damaĝojn al KEL. Kion signifas tio? Lanĉi akuzojn ne estas bona vojo al kunlaboro. Kaj oni povus aserti tute bone la kontraŭon. Ni ne estas juĝistoj, nek ni intencas transformiĝi en iun tribunalon. Mi miras ke oni agnoskas ŝian diligenton. Do, iajn kapablojn ŝi havas, ŝajne, TAMEN ne sufiĉajn por esti estrarano. Kiu taksas tion? Ĉu la individuaj membroj, kiuj jam kelkfoje permesis al ŝi fariĝi B-komitato, ĉu la personoj kiuj proponis ŝin por la Estraro, ĉu malamikoj pro konkurencaj kialoj, kiuj evidente sentis sin ĝenataj de konkreta kaj sukcesa partopreno de Belošević en la internacia movado? La minacoj retirigi de UEA estas gravaj: ili indikas ke demokratio (kiu ofte pleniĝas la buŝon de multaj personoj - mi ne scias ĉu de kroatoj) bonas nur kelkfoje, kiam tio utilas kaj kiam ĝi ne utilas... oni povas forgesi ĝin. Ni ĉiuj konscias ke oni ne povas havi la subtenon



de ĉiuj, ke ni havas kontraŭulojn. Estu atentemaj: se oni sekvos la vojon elektitan de KEL, por la venontaj elektoj oni devos unue peti la landajn asociojn kaj la individuajn membrojn, pretigi liston de neŝatataj homoj, kaj nur poste okupiĝi pri eblaj kandidatoj."

La reago de s-ino Ackermann havas nenion kun la demokratio pri kiu ŝi parolas. Estas evidente, ke jam delonge ŝi estas protektanto de la "atakata" Belošević. Tion konfirmas ankaŭ ŝia sinteno el 1997, kiam la estraro de UEA en sia jara raporto notis, ke "iom ĝenas" la laboron de Kroatia Esperanto-Ligo la ĉeesto de konkuranta asocio "pretendanta tutlandecon", je kio Ackermann reagis: "La du frazoj pri Kroatio estas kritikindaj. Ja estas

vero, ke Kroatia Esperanto-Ligo agis modele, sed ĉu oni rajtas enmeti en Estraran Raporton aserton, ke pluekzisto de alia tutlanda asocio estas ĝena? Kial tiu alia ne estas menciita laŭnome? Kiu rajtas juĝi la preferon de kroataj esperantistoj aliĝi al tiu aŭ jena?"

La tiama prezidento de UEA, Lee Chong-Yeong, atentigis, ke Kroatia Esperanto-Ligo fakte estas landa asocio de UEA. Kio do estas pli natura ol protekti la interesojn de sia landa asocio per tiel malforta esprimo "iom ĝena", se estas konataj la faktoj. Brian Moon komentis, ke vere temas pri tre milda vortumo, kaj akcentis ke, "estas strange, se la estraro ne rajtus diri tion". Ĉu el ĉio-ĉi ne sekvas, ke Ackermann provas havi superan povon al la estraro kaj dikti la regulojn? Tion ŝi ja faris ankaŭ en la kandidatiga kampanjo de Beloŝević. Ŝi pravas, ke laŭ la Elekta Regularo ŝi ne devis demandi iun ajn pri la kandidatoj. Tion diras la regularo, sed kion diras la moralo? Ĉu almenaŭ el vidpunkto de bona informiteco oni ne davus informiĝi pri la kandidato, kaj de kiu oni devus peti tiaspacajn informojn, se ne de la landa asocio?

Akcepti kritikojn je propra laboro ne estas facila afero. Simile reagus ĉiu atakito. Tamen, por povi kompreni la rolon de Beloŝević oni devus scii iomete pri ŝia agado, kiun Ackermann taksas sufiĉa por fariĝi estrarano.

Beloŝević aktivis dum jardekoj en diversaj sferoj. Tion neniu povas kaj eĉ ne volas malkonfirmi. Tamen, ekzistas aferoj pri kiuj oni ne povas silenti, kvankam la kroataj esperantistoj silentas jam 15 jarojn kaj lasas ŝin labori. Sed, pardonu s-ino Ackermann, labori en loka, landa aŭ eĉ internacia kampoj estas io alia ol fariĝi estrarano

de UEA, ĉar tiam estas bezonataj iomete aliaj kapabloj! Bele skribis en sia diskuto komitatano Sjoerd Bosga, ke li "persone elektus prefere tiujn kiuj serĉas solvojn kaj kapablas kompromisi ol tiujn kiuj serĉas problemojn kaj montras per fingroj al aliaj". Beloŝević certe estas persono kiu laboras kaj serĉas solvojn, sed neniel kompromisas. Montrastion la evoluo de la rakonto pri Kroata Esperantista Unuiĝo (KEU), la konkurenca asocio de KEL.

La fondon de KEU iniciatis Radenko Miloŝević, kies kunlaboranto estis Marija Beloŝević, pro la fakto, ke li ne estis kontenta pri neokazinta eksmembriĝo de KEL el Jugoslavia Esperanto-Ligo en tempo kiam Jugoslavio disfalis. Li estis prezidento de KEU kaj Marija Beloŝević ĝia sekretario. Kiam montriĝis, ke Kroatio havos gravajn konsekvencojn, kaj kiam estis necese ke UEA decidu pri landaj asocioj el noveformitaj landoj, la 21-an de julio 1992, senpere antaŭ la viena UK, estis subskribita komuna deklaro de ambaŭ ekzistantaj organizaĵoj en Kroatio: KEL kaj KEU. La plej grava riproĉo al (mal)kompromisemo de Beloŝević estas ĝuste malobeo de tiu deklaro, nome de ĝia alineo ke "Sesembra komisiono de ambaŭ estraroj preparas unuiĝkunvenon", kiun cetere ŝi subskribis. La deklaro estis bazo sur kiu Kroatia (poste Kroata) Esperanto-Ligo estis elektita kiel oficiala landa asocio de UEA. Kvankam post tia decido Beloŝević forigis, helpe de kelkaj personoj la ĝistiaman prezidenton de KEU Miloŝević, la ĉefa celo de KEL estis atingita, kaj do ne nepri malhelpi la funkciadon de KEU, ĉar ĝi restis laŭleĝe registrita




### LETERO AL UEA-KOMITATANOJ

Karaj komitatanoj, mi deziras ke Universala Esperanto-Asocio prosperu. Havante sian 100-an jubileon, UEA devas havi kompetentan estraron je la nivelo de sia tradicio kaj je la nivelo de la epoko. Leginte raporton de la Elekta Komisiono kaj informiĝinte, ke Marija Beloŝević el Kroatio, kandidatas por la estraro (kaj ke ŝia intereso en ĝi estas Landaj Asocioj), permesu atentigi, ke Marija Beloŝević ne embras en kroata Landa Asocio, ke ŝi fondis kaj gvidas ekde 1991 sian apartan Esperanto-asocion konkurenca al Kroata Esperanto-Ligo. Marija Beloŝević ne kontribuas al harmonia agado pri Esperanto en Kroatio. Ŝia agadmaniero kaŭzis al Esperanto-Movado en Kroatio plurajn damaĝojn. Mi opinias ke – malgraŭ sia diligento, ŝi ne kompetentas esti estrarano de UEA. Mi petas akceptu la suprajn informojn kiel kompletigo de biografio de la kandidato por la estraro. La komitatanoj bonvolu elekti laŭ sia konscienco. Pluraj membroj de Kroata Esperanto-Ligo, ne nur Pleadin kaj Klobuĉar, kies leteroj cirkulas tra la reto, protestis ĉe mi, kaj kelkaj anoncis retiri sian membrecon el UEA, en kazo de elekto. La Prezidentaro de Kroata Esperanto-Ligo havos sian regulan kunvenon en julio. Pri ĝiaj starpunktoj mi volonte informos tiam. Ĵoran saluton

**Spomenka Štimec - A-komitatno por Kroatio**





organizaĵo. Male al Ackermann, ĝuste tio estis la ĉefa eraro de kroatiaj esperantistoj, ĉar malfermiĝis libera spaco por poste okazintaj problemoj. Tamen, pro la demokratiaj principoj, nenio estis oficiale farita. Tre bonan komenton al la diskutgrupo de komitatanoj sendis Yves Bellefeuille, kiu diris: "Mi ne pensas ke necesas peti ke la elekta komisiono ŝanĝu sian raporton. La komisiono faris sian raporton, kaj la fina decido pri la estraro nun estas ĉe la komitato. (Mi jam diris, ke mi konsideras la nunan proceduron terure maldemokratia, ĉar oni apenaŭ povas paroli pri elektoj se estas nur unu kandidato.) Pli interesas min scii, ĉu la elekta komisiono konis tion, kion oni nun riproĉas al tiu kandidato kaj konkludis ke la riproĉoj ne estas validaj, aŭ ĉu ĝi ne konis tiujn riproĉojn." Evidentas, ke s-ino Ackermann konis la riproĉojn. Ĉu la aliaj? Supozeble ne, aŭ ne sufiĉe detale! Ĉu tio supozigas, ke Ackermann manipulis per voĉoj de membroj de la elekta komisiono? Pri la (mal)demokratia principo de la elektoj konsentas multaj membroj de UEA, kaj kiel videble eĉ la komitatanoj!

Renato Corsetti opinias, ke indus enkonduki regulon, laŭ kiu ĉiam devas esti pli da kandidatoj ol postenoj. Edvige Tantin Ackermann, aliflanke, rekomendas drastajn reformojn. Ŝi proponas ne nur ke nepre estu pli da kandidatoj

ol da postenoj, sed ankaŭ ke nur B-komitatoj, rekte elektitaj de la individuaj membroj, rajtu iĝi estraranoj de UEA. Ŝi diris ankaŭ: "Komitatoj A reprezentas la landajn asociojn kaj similajn, do estas elektitaj de siaj organizoj ne ĉiam ĉar ili estas la plej taŭgaj kaj kapablaj. Komitatoj C estas

## RETMESSAĜO DE RADENKO MILOŠEVIĆ AL KIU MARIJA BELOŠEVIĆ NE RESPONDIS

S-ino M. Belošević,

Mi proponas, ke vi **retiriĝu por certe tempo el la kandidatlisto por Estraro de UEA!**

La kialo de tiu mia propono estas, ke post dekjara silento mi decidis reagi pri la aferoj kiuj rilatas Vin kaj Vian agadon! Mi menciu nur la tempon kiu okazis ene de Esperantujo, riproĉojn kaj laŭdojn pro via laboro diversflanke tra la mondo - ĉio ĉi estas malbona por Esperanto, nia Hejmlando Kroatio kaj, finfine, ankaŭ por Vi mem.

Al mi ŝajnas, ke krom Via obstina strebado kaj viaspeca agemo, vi povus esti misuzita de iuj, al mi nekonataj, Esperanto-aktivuloj.

Vi havas kelkajn eblecojn: (1) respondi al mia ret-letero, (2) ne respondi, (3) retiriĝi kaj (4) pluri laŭ Via volo!

La lastan eblecon mi ne rekomendus!

Mia pacienco kaj mia bonkora alta taksado de Via iama laboro kaj kunlaboro, povus finiĝi!

La batalon por Esperanto kaj samtempe per Esperanto por Vi mem - pli frue kaj ankaŭ en la lastaj dek jaroj mi rigardis sen amara koro!

Nerekomendinda estus tro granda rememor-streĉo - eble mi rememorus ĉion preterlasitan ekde la momento, kiam mi estis fondinto kaj prezidanto de "Kroata Esperantista Unuiĝo" kaj fondinto de "Kroata Esperantisto", post kio mi estis forpelita per via agado!

Trankvilanime mi ĉion tion lasis preterpasi. Ja estis Hejmlanda Militigo kaj miaj diversaj taskoj estis tro respondecaj, kvankam mi estis "nur guto en la hejmlanda akvofalo".

Mi lasos al Vi kaj al Viaj eventualaj kunlaborantoj (inter kiuj, el tiama tempo - mi konas du!), ke vi pensu pri mia propono ene de kelkaj tagoj, ĉar post tiam mi sendos leteron aliflanke!

Salutas Vin  
eksprezidanto kaj kunfondinto de  
Kroata Esperantista Unuiĝo  
Mag. Radenko Milošević

elektitaj de la komitato ne ĉiam laŭ la preskriboj de la Elekta Regularo, sed nur ĉar tiu estas amiko de amiko de amiko, aŭ ĉar oni ne kapablas diri "ne, vi ne plenumas la kondiĉojn por tio". Pluraj personoj, kiuj ŝatus fariĝi komitatanoj kaj eĉ estraranoj, emas al kandidatiĝo kiel komitatano C. Oni opinias ke tio estas pli facila kaj malpli "riska". Oni preferas eniri tra la fenestro anstataŭ tra la pordo. Pluraj personoj ne pretas fronti la prijuĝon de la Individuaj

Membroj, eĉ homoj kiuj ricevas grandan konsenton. Tamen tiu, kiu volas gvidi la movadon, devas tion fronti kaj taksu la apogon de la individuaj membroj. Sen ĝi oni ne havas la sufiĉan forton. Laŭ mia opinio, la Elekta Komisiono tre atente prikonsideros la kandidatiĝojn por C-komitata-neco, ankaŭ sekve de la jusaj rezultoj. Tia granda reformo tamen postulus komplikajn ŝanĝojn en diversaj regularoj kaj apenaŭ estas rapide realigebla, eĉ se la komitato tion dezirus."

La lastaj frazoj de Corsetti kaj Ackermann klarigos la tutan aferon al bonintenca leganto. Do, ne temas nur pri Beloŝević, sed pri ĝeneralaj principoj de demokratio. La komitatanoj de UEA, sur kies ŝultron estis metita la ŝarĝo decidi pri konsisto de la estraro, certe agos laŭ sia konscienco, sed antaŭ ol voĉdoni, oni devas havi disponeblajn informojn kaj pesi ilian pezon. Post la UK en Jokohamo ni volonte raportos pri ilia decido.

## OFICIALA STARPUNKTO DE KROATA ESPERANTO-LIGO

Estimataj komitatanoj,  
estimata sinjoro prezidanto,  
estimata sinjoro ĝenerala direktoro,

Kroata Esperanto-Ligo, kiel Landa Asocio de UEA, en sia kunsido de la 2-a de julio 2007 esprimis malkontenton kaj akran proteston pri maniero kiel laboris la Elekta Komisiono de UEA, kiu proponis al la estraro de UEA personon el Kroatio, kiu ne membras en Landa Asocio, sed kiu fondis paralelan asocion en Kroatio kaj tiun asocion gvidas. Tiu propono malestimigas la laboron de Landa Asocio Kroata Esperanto-Ligo, kies laboroj kaj rezultoj estas respektataj enlande kaj eksterlande. Nia starpunkto estas, ke ne estas grave ĉu iu el Kroatio estas proponita por la estraro aŭ ne, sed gravas ke por la estraro estu proponitaj la plej kompetentaj esperantistoj el nia internacia komunumo. Laŭ ni, la Elekta Komisiono agis nekompetente, ĉar ĝi proponis nekompetentan personon. Ni, membroj de la Prezidantaro de KEL ne volas enmiksiĝi en la elekton de la estraro, sed ni deziras ke vi, la komitatanoj konu nian starpunkton.

Kun granda estimo, kore vin salutas  
por la Prezidantaro  
**Vjekoslav Morankić**  
vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo

## OPINIOJ

En sia letero al la ĝenerala direktoro de UEA, **Radenko Miloŝević, unu el la vicprezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo** skribis, interalie:

"Akcepti malserioze opinion de landa asocio kaj pluraj gvidaj esperantistoj el lando el kiu venas kandidato por tiel serioza funkcio, estus laŭ mi tre riska. Speciale rigardata en lumo de malbonaj rilatoj de la Estraro kun la oficistoj en la Centra oficejo, kio kaŭzis la krizon post la zagreba UK. Tia situacion UEA vere ne plu bezonas. Pri tio devas konscii ankaŭ la komitatanoj, kiuj sian voĉon donos eble al s-ino Marija Beloŝević."

...

**Zlatko Tišljar** en "Libera folio" skribis: "En sia biografio Marija Beloŝević skribas, ke ŝi estas diplomita internacia pedagogo de Esperanto. Ĉu iu aŭdis pri universitato aŭ akademio kiu disponigas tian diplomon? Marija Beloŝević finlernis en meza ekonomia lernejo en Zagrebo kaj neniam finis iun ajn universitatan studon. Ŝi partoprenis en Ljubljana (samkiel mi) dusemajnan seminarion pri E-pedagogio kiun kune organizis la Filozofia fakultato en Ljubljana kaj la Budapeŝta universitato Eötvös Lorand kaj en kiu ĉefprelegis doktor Szerdahelyi. Por partopreno en tiu seminario ŝi ricevis atestilon. Estas granda trompo, kiun daŭre disvastigas Marija Beloŝević pri siaj studatingoj, levante la menciitan atestilon al la rango de diplomo."



# JARKUNVENO DE KROATA ESPERANTO-LIGO

*Laŭ la oficiala protokolo de KEL*

La 12-an de majo kolektiĝis reprezentantoj de kroataj esperantistoj en la regula Jarkunveno, kiu okazis en la sidejo de Kroata Esperanto-Ligo en Zagrebo.

Krom la membroj de la Estraro (Radenko Milošević, Ljerka Stilinović, Vida Jerman kaj Marija Jerković), la Jarkunvenon partoprenis ankaŭ reprezentantoj de societoj: el Zagrebo Nedeljko Korasić, Spomenka Štimec, Sava Matetić-Lučić, Bojana Đuričić, Anto Mlinar, Judita Rey-Hudeček, Boris Ĉović (ĉiuj membroj de "Bude Borjan"), Antun Kovač, Dragutin Štoković, Branko Repac kaj Snježana Matko (reprezentantoj de blindaj esperantistoj de Kroatio), Dag Treer kaj Kaja Farszky (reprezentantoj de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo), Anka Špehar-Šantolić (reprezentantino de fervojistoj-esperantistoj el Zagrebo), el Rijeka Vjekoslav Morankić kaj Boris Di Costanzo (reprezentantoj de la tiea societo), el Osijek Saša Kocian (reprezentanto de Esperanto-societo "Liberiga Stelo"), Ružica Jukić kaj Štefica Orešković (reprezentantoj de Esperanto-societo el Slavonski Brod), Stjepan Žarina (reprezentanto de Esperanto-societo "Svijet mira" el Velika Gorica Josip Pleadin (reprezentanto de individuaj membroj) kaj kiel gastoj Srećko Radulović el Sisak kaj Tihomir Lovrić el Sveti Križ Začretje.

Forestis: prezidanto Dalibor Brozović (Zagrebo), Davor Klobučar (Osijek), Zlatko Hinš (Zagrebo), Roža Brletić-Višnjić (Zagrebo), Mirjana Zjačić (Zagrebo), Davor Grgat (Split), Jasmina Cecić (Split), Miroslav Jelkovic (Karlovac), Ĉiril Stojanov (Karlovac), Snježana Rusman (Varaždín), Stanko Rukelj (Varaždín) kaj Dušan Adnadj (Borovo).

La kunvenon malfermis la sekretario de Kroata Esperanto-Ligo Spomenka Štimec, post kio estis elektita laborestraro (Morankić, Milošević kaj Štimec - kiu estis

ankaŭ la protokolanto). Kontrolistoj de la protokolo elektis Nedeljko Korasić kaj Boris Ĉović. Prezidanto de la laborestraro estis elektita Vjekoslav Morankić, kiu plue gvidis la kunvenon.

Antaŭ ol la kunveno komencis pritrakti la tagordon, Radenko Milošević petis la parolrajton kaj prezentis la unuan numeron de "Zagreba Esperantisto" kaj anoncis fondon de Zagreba Esperanto-Ligo.

Aparta komisiono (Boris Di Costanzo kaj Bojana Đuričić) konstatas ekziston de kvorumo, post kio estis konfirmitaj novaj membroj de la asembleo de KEL: Josip Pleadin kaj Dušan Adnadj kiel reprezentantoj de individuaj membroj kaj Stjepan Žarina kiel reprezentanto de Esperanto-societo el Velika Gorica, kiu estas nova societo aliĝinta el KEL.

Unuvoĉe estis akceptita la proponita 12-punkta tagordo, el kiuj la ĉefan atenton altiris la raportoj por la jaro 2006.

La raporton pri laboro de KEL en 2006 legis Spomenka Štimec, la finanĉan raporton Ljerka Stilinović kaj la raporton de Kontrolkomitato Anto Mlinar. Post la raportoj estis prezentitaj kadraj laborprogramoj por la jaroj 2007 kaj 2008.

La diskuto pri la raportoj estis mallonga. Reagis kun aldonoj Josip Pleadin, Judita Rey Hudeček, Radenko Milošević kaj Antun Kovač. Petojn pri helpo prezentis Stjepan Žarina el Velika Gorica kaj Srećko Radulović el Sisak.

Antun Kovač petis klarigon pri la negativa saldo el la pasintjara financa raporto (15.000 kunaĵoj). La klarigon donis Vjekoslav Morankić.

Post voĉdonado pri la raportoj, ili estis akceptitaj kun unu detenita voĉo (Josip Pleadin nome de la individuaj membroj).

La Jarkunveno finiĝis je la 13h00, post kio sekvis lunĉo kaj libera konversacio de la ĉeestintoj.

## LASTATEMPAJ DONACOJ AL STUDBIBLIOTEKO KAJ ARKIVEJO EN ĐURĐEVAC



Josip Pleadin

### S-ino Nada Med, donacinto de tre valora dokumentaro

En junio estis akceptitaj, krom pluraj malgrandaj, ankaŭ du gravaj donacoj. La unua, la 4-an de junio, estis donacita de **NADA MED** el Vinkovci. Temas pri ĉirkaŭ 200 libroj kaj broŝuroj, 1200 ekzempleroj de diversaj gazetoj, 32 gazetartikoloj, enkadrigitaj fotoj de Zamenhof kaj la unua kurso en Vinkovci el 1920-aj jaroj, la societa ŝildo kaj la plurnil-era dokumentaro el la periodo 1953-1971. Krome, en la donaco troviĝas ankaŭ plurcento da aliaĵoj: flagoj, prospektoj ktp. La tuta arkivo apartenis al iama Esperanto-societo "Nova Epoko" en Vinkovci. El la ricevita materialo, la dokumentaro estas ordigita en novaj dokumentujoj, la mankantaj numeroj de gazetoj estas aldonitaj al la kolektoj por bindado, kaj el la duoblaĵoj, 37 pecoj (ĉefe de "La Suda Stelo" el periodo de antaŭ la dua mondmilito), estas donacitaj al Kroata Esperanto-Ligo por kompletigi ties kolekton.

La dua donaco venis la 13-an de junio de **BRANKA REHORIC**, vidvino de antaŭ nelonge forpasinta Danko. Temas pri 25 libroj, 560 kovertoj kaj pluraj aliaj malgrandaj (tradukoj, gazetartikoloj), kiuj ĉefe apartenis al Zvonko Rehoric, la patro de Danko.

Pro la donacoj ni kore dankas kaj invitas ankaŭ aliajn esperantistojn helpi pliampleksigi kaj kompletigi la kolekton, kies servoj jam uzblas de unuopaj esplorantoj kaj institucioj.

# 5-a FAMILIA MKR OKAZIS EN SLOVENIO

  Vanja Radovanović



Inter la 11-a kaj 13-a de majo en montkabano *Andrejev dom* na Slemenu (norda Slovenio) okazis 5-a Familia MKR. Ĉi jare la aranĝon partoprenis 18 partoprenantoj (el ili 8 infanoj) el 6 familioj el 3 landoj (Hungario, Kroatio, Slovenio).

Kiel kutime, la celo de tiu jam tradicia aranĝo estis pasigi agrablan tempon en naturo, en bonhumura Esperanto-etoso. Denove renkontiĝis malnovaj amikoj, kaj plenkreskaj kaj junaj (bedaŭrinde, neniu nova familio partoprenis la aranĝon ĉi-jare), denove ni ludis diversajn ludojn kaj ankaŭ ĉi-foje ne mankis migrado tra bela arbara ĉirkaŭaĵo de la MKR-ejo. Plej ŝatataj estis ludoj kun eta ligna ludtrajno: ĝiaj reloj okupis du tutajn tablojn en la manĝejo. Ankaŭ la ekskurso per kiu finiĝis la aranĝo (vizito al fermita minejo ĉe Mezica), rilatis al trajnoj, ĉar la partoprenantoj vizitis aron da subteraj tuneloj per malgranda minista trajno. Veturado per ĝi estis neforgesebla sperto!

Do, la celo de la aranĝo estis plenumita, kaj la infanoj kaj gepatroj amuziĝis kaj ripozis, kio donis al ĉiuj eblecon fari etan Esperanto-paŭzon dum printempa sezono. Spite al tio evidentiĝas, ke nur malmultaj familioj partoprenas la aranĝon. Kvankam Esperanto-familioj en Kroatio kaj najbaraj landoj ne multnombras, tamen pluraj pliaj loĝas en tiu ĉi regiono, sed pro diversaj kialoj ne povas aŭ ne emas veni. Aldonaj problemoj estas la distancoj - ne estas ĉiam agrable vojaĝi dum pluraj horoj por partopreni nur 2-tagan aranĝon - kaj taŭgaj ejoj. Ne multaj ejoj estas taŭgaj por tiuspeca aranĝo, precipe se oni tenas la kostojn pageblaj por plej multaj.

Bona afero kiu rilatas al Familia MKR estas, ke la aranĝo iĝas pli kaj pli konata. Pluraj ekstermezeŭropaj familioj scias pri ĝi kaj jam kelkaj provis plani la alvenon. Foje aperas artikoloj kaj informoj pri ĝi en Esperanto-medioj kaj ni esperas ke en estonteco ĝi havos pli da partoprenantoj el pli da landoj.



Via Parini 5, IT 34129 Trieste  
orbispictus@iol.it  
tel/fax: + 39 / 040 767 875

## Orbis Pictus

de Višnja Branković

### MARO 2007 / 2008

**08-15.09.07.**

**Somera Semajno en Selce**

Kiam oni ĝuas pli kaj pagas malpli.  
Duonpensiono: ekde 119 eŭroj en dulita ĉambro.  
Aliĝkoto: 24 eŭroj (ĝis 17.07.07).

**16-18.11.07.**

**Bonfartiga Semajnfino, Lovran**

Kun partopreno en la solena E-festo en Rijeka.

**oktobro 2007 / majo 2008**

**Biograd na moru**

Se vi ne emos vintri, frosti, pagi la hejtadon... venu (kun)loĝi en Biograd.

**En la pensiono de esperantisto Ante -**

**ŝparu ĝuante...**

\* \* \*

**SSSS ...**

**Surprizaj Senpagaj Sabatoj en Slavonio**  
(ekde septembro 2007)





P  
O  
K  
A  
L  
O



K  
O  
S  
T  
R  
E  
N  
A

2007

✂ Emil Hrvatini    🏆 Boris Di Costanzo

Konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj "Pokalo Kostrena 2007" okazis ĉi-jare en Kostrena de la 25-a ĝis la 27-a de majo. La konkurso por elementaj lernejoj estis la sesa sinsekva kaj por mezlernejoj la dua. La konkursojn, kiujn KEL kaj Esperanto Societo Rijeka okazigis en skolta restadejo Esperanto Domo, partoprenis 21 lernantoj el ses elementaj kaj tri mezaj lernejoj el Zagreb, Sveti Križ Začretje, Dubrava Vrbovečka, Rijeka kaj Sesevete. Samtempe kaj samloke Kroatia Esperanto-Junularo Asocio kaj Esperanto-societo Rijeka organizis Junularan Renkontiĝon kiu ĉi-jare restis kroata. Oni bone sentis ĉeeston de la junularo kiu preparis amuzajn vesperajn programerojn kaj kreis bonegan etoson. La programo daŭris de vendredo antaŭtagmeze ĝis dimanĉo posttagmeze. La konkurso mem okazis sabaton, la 26-an. Post la konkursoj la partoprenantoj ekskursis al Opatija. Dimanĉon konkurs-komisiono proklamis la rezultojn:

**Kategorio "A"** (komenca): 1. Nikolina Gegić (Elementa Lernejo "Retkovec" Zagrebo), 2. Veronika Brnabić (E. L. "Zrinski", Zagrebo), 3. Dominik Radelić



(E. L. "Dragutin Tadijanović", Zagrebo)  
**Kategorio "B"** ( progresinta): 1. Dora Hoelbling (E. L. "Mladost", Zagrebo), 2. Monika Dabo (E. L. "Mladost", Zagrebo). La tria premio ne estas atribuita.

En la konkurso de lernantoj el mezlernejoj atingitaj estas sekvaj rezultoj: 1. Unuan lokon partumas: Andela Kanjuo (Kemijsko-grafiĉka ŝkola Rijeka) kaj Drago Iliŝinović (Srednja ŝkola, Sesevete), 3. Dobrila Avramović (Graditeljska ŝkola za industriju i obrt, Rijeka).

"Pokalon Kostrena 2007" por la plej bona lernejo gajnis Elementa Lernejo "Mladost", Zagrebo. La plej sukcesaj lernantoj kaj lernejo estas premiitaj per pokaloj kaj diplomoj. Ĉiuj partoprenintoj ricevis donace la libron "Triopo Terura" de kroatia verkistino Antoaneta Klobuĉar.

## LA PLEJ DETALA ESPLORO

Davor Klobuĉar, nia aktivulo el Osijek, venigis siajn esplorojn pri la unuaj osijekaj esperantistinoj (el 1889) al provizora fino. Dum pluraj monatoj li intense serĉis ĉion, kio povus klarigi iliajn rolon kaj vivon. Per tiu esploro ekestis materialo, kiu nun aperas broŝurforme.



PRVI  
 ESPERANTISTI  
 U HRVATSKOJ

La teksto estas kroatlingva, ĉar ĝi ĉefe devus servi por instigi la lokajn osijekajn aŭtoritatojn doni la nomon de Esperanto al unu el la osijekaj stratoj. Tamen, la materialo multe superas tiun bezonon. Temas pri iaspeca studo pri homoj kaj epoko en kiu vivis la kvinopo esperantista, kies nomoj aperis en la unua Zamenhofa adresaro.

# RAPORTO EL PARIZO

✍ **Marica Brletić**    🏠 **Martin Stuppniĝ**

De la 13-a ĝis la 19-a de majo 2007, en Parizo okazis la 59-a Internacia fervojista Esperanto-kongreso. Jam kvinfoje francaj fervojistoj gastigis IFEF - kongreson kaj la duan fojon en la ĉefurbo, karesnomata la "lumanta urbo" kaj mondkonata pro sia historio, kulturo kaj vivmaniero.

Partoprenis 268 gekongresanoj (inter ili 9 el Kroatio) el 24 landoj, inter kiuj ankaŭ el tri ekstereŭropaj landoj - Ĉinio, Kongo DR kaj Niĝerio. Tio aparte menciindas, se estas konate, ke la ĉefa instanco sub kies aŭspicio IFEF funkcias kaj okazas ĉiuj fervojistaj kongresoj, estas FISAIC - Internacia Federacio de Kulturflugantaj Fervojistoj. Laŭ graveco, la dua instanco estas Internacia Unuiĝo de la Fervojoj (UIC) kun kiu IFEF aktive kunlaboras en la kampo de faka terminologia laboro - "Rail Lexic". Ambaŭ organizoj aktivas nur en Eŭropo. Multaj fakaj, Esperantaj kaj lokaj eminentuloj ĉeestis dum la solena malfermo kaj bondeziris la kongresanojn, LKK-n kaj komisiitojn.

S-ro Renato Corsetti - prezidanto de UEA, en sia salutparolado, kiam li rememorigis



*La trajnkapo kaj laboratoria vagono de la monde rekorda TGV sur la ponto sur Sejno en Parizo, dum tutsemajna ekspozicio.*



pri la problemo de la varmigo de la Tero, rekonis fervojojn kiel unu el grandaj progres-faktoroj de la homaro, kaj fervojistoj estas la plej firmaj subtenantoj de la movado por Esperanto.

S-ro Krešo Barković salutis nome de SAT, s-ro Bruno Flochon (prezidanto) nome de Unuiĝo Franca po Esperanto, s-ro Hubert Peyrouy nome de SAT-Amikaro, s-ro Tschanz reprezentis FISAIC, s-ino Roasalinde Täucher nome de UIC. S-ro Jean-Christophe Zaleski Zamenhof, la nepo de Zamenhof ankaŭ ĉeestis kaj salutparolis.

Dum la kongresa semajno, la komitatanoj kaj kongresanoj sekvis la jam konatan kaj kutiman programon, kiu inkluzivis kunsidojn, fermitajn aŭ malfermitajn, plenkunsidon, fakkunsidojn, ĉefan prelegon, fervojajn novaĵojn, fakan kaj aliajn ekskursojn kaj kultur-amuzajn vesperojn.

Kelkaj membroj estis honorigitaj per honora membreco kaj honoraj diplomoj, la estraranoj kaj responsuloj pri fakaj sekcioj raportis. La situacio en landaj asocioj estis resumita per raporto de la vicprezidanto, la komitato akceptis proponon pri statut-

ŝanĝo rilatanta al Kongresa regularo, la Fake Aplika Sekcio eldonis kaj prezentis "Fervojfakajn Kajerojn" numero 13, la Terminara Sekcio estis laŭdata pro miloj da tradukitaj fakaj difinoj, okazis baloto (ĉar estis estrarelektaj jaro). La komitato decidis ke, por la nova trijara oficperiodo la Federacion denove gvidu:

d-ro Romano Bolognesi (IT) kiel prezidanto, inĝ. István Gulyás (HU) kiel vicprezidanto, Marica Brletić (HR) kiel sekretariino, Laurent Vignaud (FR) kiel kasisto kaj Jean Ripoché (FR) kiel redaktoro. La gastiganta lando preparis la ĉefan fakprelegon



*Antaŭ la plej konata muelejo en la mondo.*

de s-ro Jean Ripoche sub la titolo "Malfermo de nova linio por rapidaj trajnoj al Oriento". Ankoraŭ 13 interesajn fakajn prelegojn pri novaĵoj ĉe fervojoj en siaj landoj okazigis fakuloj el Francio, Germanio, Italio, Danio, Ĉeĥio, Rumanio, Bulgario, Kroatio. D-ro Zlatko Hinšt el Zagrebo prelegis pri "Oficiala formo de financa statistiko de UIC".

Krom multaj fakaj kunsidoj, ege interesa estis vizito al Fervoja teknika provcentro en Vitry-sur-Seine. Tie diversaj provservoj esploras, provas kaj analizas sur veturantaj materialoj kaj ligoj kun infrastrukturo. Sekrete, preskaŭ kaŝe, la teamo de 120 fakuloj tie realigis la mondan rapido-rekordon. Temas pri la plej nova modelo de elektra motor-trajno TGV de SNCF (grandrapidaj trajnoj de Francaj Fervojoj). Dum sia provveturo en aprilo 2007 la trajno TGV V-150 atingis la mondan rapid-rekordon veturante sur reloj per 574,8 km/h. Intertempe, pli precize la 10-an de junio, komenciĝis la komerca ekspluatado de la trajno inter Parizo kaj Strasburgo kun rapideco de 320 km/h.

La kongresan flagon transprenis pollandanoj kaj kunportis ĝin al Poznano, kie en majo 2008 la fervojistoj denove kongresos. Por la jaro 2009 sin preparas Triesto (Italio), kie IFEF festos la centjaran jubileon.

Do, kore ĝis Poznano!

 **Snježana Habulin**

## 39.000 DONACITAJ OBJEKTOJ

Al Zagrebo inter 1946 kaj 2005 estis donacitaj 27 artaj kolektoj, respektive objektoj kiuj posedas kultur-historian kaj artan valoron. Temas plejparte pri kolektoj kiuj, senkonsidere ĉu ili ekestis per konscia kolektado aŭ per familia heredo, faras koneksan tutaron, kaj por kiuj estas konstata kultura, historia aŭ arta graveco. La kolektoj kaj unuopaj objektoj estas donacitaj rekte al Urbo Zagrebo kiel jura persono, kaj la Urbo, kiel ilia posedanto, komisiis ilin por prizorgo al muzeoj kaj galeriaj instancoj, riĉiginte iliajn art- kaj histori-fundusojn. Tiuj kolektoj kaj iliaj partoj fariĝis ne nur objektoj de esplorado kaj muzea "programo", sed ankaŭ konsistiga parto de konstantaj aŭ okazaj muzeaj ekspozicioj, per kio la Urbo Zagrebo konservis ankaŭ parton de sia identeco. Per tiuj ĉi donacoj la Urbo Zagrebo fariĝis posedanto de pli ol 13.000 objektoj (pentraĵoj, skulptaĵoj, metiartaj objektoj ktp), kaj inkluzivante ankaŭ librojn (kompletajn bibliotekojn), gazetojn ktp. temas pri pli ol 39.000 objektoj.



## LA URBA TRAMO EKDE 1891

Tramtrafiko en Zagrebo komenciĝis la 5-an de septembro 1891, kiam tra ĝiaj stratoj pasis la unua ĉevaltramo, kiu ekde tiu tago transportis ĉirkaŭ 20.000 Zagrebanojn. La investinto de la unuaj traminstalaĵoj kaj ĉefaj tramlinioj, finitaj dum rekordaj kvar monatoj, estis Societo de zagrebaĵaj loĝantoj, al kiuj la koncesion, ricevitajn de la tiamaj urbaj aŭtoritatoj, cedis, pro la monrekompenso, la franca inĝeniero Alexandar Gautier, cetera ideo aŭtoro pri enkonduko de tramtrafiko. La ĉevaltramon kiel urban trafikilon, Zagrebanoj uzis ĝis 1910, kiam anstataŭigis ĝin elektra tramo, realigita merite de entreprenista ideo de la nove fondita akcia societo "Zagreba elektra tramo". Ĝia estraro en 1931 ricevis koncesion ankaŭ por bustrafiko, kiu en Zagrebo estis enkondukita en 1927. Per tio estas farita fundamento de la hodiaŭa ZET-entrepreno, kies laboro ekde tiam sekvas evoluon de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj ĝi mem fariĝis tradicia portanto de publika urba transporto en Zagrebo.

## LA UNUA WINNETOU KONVENCIO - KROATIO 2007

*Vida Jerman*

En la hotelo "Alan" en Starigrad Paklenica (apud Zadar) inter la 26-a kaj la 29-a de majo 2007 okazis la Unua Winnetou Konvencio en Kroatio. Ĝi estis organizita de "Jadran film" el Zagrebo en originalaj lokoj de la filmado: Nacia Parko Paklenica, Malgranda Alan sub montoĉeno de Velebit, altebenaĵo ĉe la urbo Obrovac kaj Nacia Parko Krka. En tiuj lokoj en 1960-aj jaroj estis filmitaj dekoj da epizodoj pri la aventuroj de indiana tribestro Winnetou kaj liaj amikoj Old Shaterhand kaj aliaj herooj de famaj verkoj de Karl May. La konvencio ĉeestis 150 personoj el Germanio kaj Aŭstrio kaj deko da honoraj gastoj, iamaj aktoroj el Kroatio, Slovenio kaj Serbio. La malfermo okazis en la hotelo "Alan" per prezentado de la honoraj gastoj. Sekvis ĝin komuna vizito al indiana vilaĝo – „Pueblo plato“, konstruita por bezonoj de la filmado. Kun belega panoramo al la kanjono de rivero Zrmanja, la honoraj gastoj kaj adorantoj de Winnetou ĝuis vespermanĝon apud tendara fajro spektante artofajraĵon. Dum postaj tagoj okazis vizitoj al originaj lokoj kie Winnetou-epizodoj estis filmitaj. Mallongaj paŭzoj estis rezervitaj por prezento de la libro "Laŭ la spuroj de Winnetou en Kroatio" kunaŭtorita de Vladimir Tadej kaj Damir Gabelica. Premiere estis projekciita la 30-minuta dokumenta filmo de Vladimir Tadej "Sur lokoj de filmado de Winnetou".



**Maldekstre:**  
*Winnetou kaj Old Shaterhand.*

**Malsupre:**  
*Vida Jerman kiel juna aktorino.*

**Plej malsupre:**  
*Vida Jerman en la Konvencio disdonas aŭtogramojn.*

Ni, menciuj, ke en Germanio kaj Aŭstrio jam tridek jarojn ekzistas kluboj de "La adorantoj kaj amikoj de Karl May" kaj "Karl-May - Arkivo", kiu ĝis nun eldonis du librojn pri aktoroj kaj aliaj kunlaborantoj en filmado de Winnetou. La germana televido en siaj elitaj terminoj kelfoje jare elsendas filmojn de Karl May kaj la "Klubo de amikoj de Karl May filmoj" ĉiujare organizas Winnetou konvenciojn.

Kiel juna aktorino, en 1968 mi ludis la rolon de "Saloon girl" en la filmo "Winnetou en morto-valo" kun fama germana aktoro Eddi Arent. Kvardek jarojn poste mi estis honora gastino en la Konvencio.



Antaŭ dekkvin jaroj leteroj de adorantoj kun miaj fotoj el filmo "Winnetou en morto-valo" alvenis al mia hejma adreso kun peto, ke mi subskribu ilin. Ĉiujare mi ricevas dekon da leteroj kun la sama deziro. Kiom mondfamaj estas geaktoroj rolintaj en Winnetou-filmoj, mi perceptis apenaŭ en la kroata Konvencio, kiam vicoj da adorantoj trankvile atendadis por ricevi niajn aŭtogramojn. Mi estis vere kortuŝita, kiam unu el ili donacis al mi albumon kun miaj fotoj kaj biografio. Neniu estas profeto en sia propra lando. Kiam niaj ĵurnalistoj demandis min, ĉu mi denove ŝatus ludi en filmoj pri Winnetou, mi respondis: "Jes, volonte, sed nuntempe mi verŝajne ludus la rolon de "madamme".



# "SKLAVOJ DE DIO" PERE DE ESPERANTO TRADUKITA AL LA KROATA

✍️ Josip Pleadin

La 77-jara samideano Aleksandar Kocian (karesnomita Saša), el Osijek, jam de pluraj jaroj konservas en sia tirkesto la 400-paĝan manuskripton de traduko, en kiu Esperanto servis kiel pontlingvo. Kutime en Kroatio oni tradukadis al Esperanto, kaj Esperanto servis kiel pontlingvo por traduki la kroatajn literaturajn verkojn al aliaj lingvoj.

S-ano Kocian elektis inversan vojon. Leginte la romanon de Géza Gárdonyi, hungara verkisto, titolitan "Sklavoj de Dio", kiun Hungara Esperanto-Asocio en traduko de Johano Hamvai eldonis en 1972, li trovis ĝin tre interesa. Ĉe li naskiĝis la ideo traduki la verkon el Esperanto en la kroatan. Imagita - farita! Ĉar li ne konis la hungaran, li uzis la Esperantan version, kaj iom post iom el lia tajpmaŝino kreskis fasko da paĝoj. La traduko ricevis kroatlingvan titolon "Božji robovi".

Gravas mencii, ke Gárdonyi en la kroata estas konata laŭ sia alia romano, kiu eldoniĝis sub la titolo "Egerske zvijezde". Ĉar "Sklavoj de Dio" en la kroata ne ekzistas, temas do pri grava interkultura interŝango.



La manuskripto longe kuŝis malantaŭ la okuloj de la publiko. Maloftuloj sciis, ke s-ro Kocian faris ĝin. Finfine, ĝi venis en la manojn de esperantisto Domagoj Vidović, kiu lingve korektis la tekston.

Antaŭ kelkaj semajnoj, s-ro Kocian demandis min, ĉu eblus iel publikigi la verkon, ĉar

li ja evidente estas en aĝo, kiam li volus lasi ion konkretan por postaj generacioj. Tiel la kopio de la manuskripto venis kiel kontribuajo al la Studbiblioteko kaj arkivejo kiu formiĝas en Đurdevac. La aperigo ankoraŭ ne estas certa, sed ni almenaŭ diskonigu la informon, ke la traduko ekzistas. Se ne en presa formo, ni faru ĉion eblan por almenaŭ elektronika publikigo.



## PASINTJARA PROJEKTO EN EŬROPA UNIO

✍️ Jozo Marević

Pasintjare en Eŭropa Unio okazis projekto pri kiu en Kroatio ni ne estis ĝustatempe informitaj. La projekto nomiĝas **LatinAlEsperanto**, kaj la saman nomon oni atribuis ankaŭ al la grupo, kiu okupiĝis pri la projekto. Dum la dua duono de la pasinta jaro (de la 1-a de julio ĝis la 31-a de decembro) Finnlando prezidis Eŭropan Union aŭ, pli bone dirite, Finnlando okupis tiutempe la

prezidantecon de Eŭropa Unio. Fakuloj en la finna delegacio decidis ĉiusemajne eldoni mesaĝojn (inter aliaj lingvoj) ankaŭ latinlingve.

Kiel en la kunvenoj, kiujn ofte ĉestis ŝtatestroj kaj/aŭ registarestroj de ŝtatoj-anoj de Eŭropa Unio, samtiel niaj tradukoj estis rigardeblaj per interreto aŭ per arkiva dosiero elŝutebla ĉe retejo [www.eu2000.fi](http://www.eu2000.fi). La traduko, kiun faris ĉiam alia grupano, estis kontrolita flanke de ĉiu unuopa grupano (ĉar la tradukon ricevis ĉiu ano pere de Interreto), korektita kaj plibonigita, kaj tiuforme sendita en la esperantistan mondon.

Samideano Tim Morley, kies abnegacio estas laŭdinda, gvidis la projekton kaj kunigis la

grupon de fakuloj en la lingvoj latina kaj Esperanto. La grupanoj estis: Alejandro Pajera, Anna Ritamäki, Armin Grötzer, Bradío V. Moro III, Gabriel Beecham, Gerrit Berveling, István Ertl, Juka Pietiläinen, Kalle Kniivilä, Jozo Marević, Päivi Saarinen, Ro Sardek kaj William Sellwood. Ili ĉiumerkrede vespere tradukis la mesaĝojn el la latina sub la titolo *Conspectus rerum Latinus* (Trarigardo de informoj latinlingvaj) en Esperanton.

La respondecujoj de [eu2006.fi](http://eu2006.fi), kiuj publikigis *Conspectus rerum Latinus* afable ricevis kaj salutis tutkontente la sindonan tradukadon Esperantlingvan. Esperanto-asocio de Finnlando permesis la uzon de sia retejo.

## 70 JAROJN VIVINTE KUN ESPERANTO

*Antun Kovač*

Tomislav Karlović, unu el la fondintoj kaj multjara prezidanto de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) ekde la 27-a de aprilo 2007 ne plu troviĝas inter ni. Li forpasis mallaŭte, preskaŭ nerimarkite, samtiel kiel dum la lasta jardeko li ŝajne ankaŭ vivis, konscie izolita de aliaj homoj, okupante sin per laboroj, kiel li mem taksis ilin, pri kiuj pli frue li ne havis tempon. En kvieto de sia hejmo, profesoro Karlović legis, verkis kaj ordigis la vivimpresojn. Kiel rezulto de tiu laboro naskiĝis kelkaj poemoj kaj aŭtobiografia verko nacilingva “*Drugi život*” (La dua vivo), en kiu, krom pri la propra vivo, li prezentis siajn starpunktojn rilate la vivon de nevidantoj ĝenerale.

Tomislav Karlović naskiĝis la 8-an de novembro 1924. En aĝo de 10 jaroj li perdis la vidpovon per propra aktivigo de eksplodado. Post tio li komencis edukiĝi en la naskiĝvilaĝo Sirač, kaj daŭrigis en la Blindulinstituto en Zagrebo. La brajlo lin tuj ekokupis, kaj li rapide ellernis ĝin. Post tio, la legado kaj verkado fariĝis liaj tutvivaj elektoj.

Por la dua mondmilito, en 1941 li ĉesis viziti lernejon kaj revenis al la naskiĝregiono. El libroj ĝis tiam legitaj, li informiĝis pri progresemaj ideoj kaj difinis sin antifaŝisto. Tiujn ideojn li propagandis inter samvilaĝanoj kiel aktiva simpatianto de popolliberiga movado, kiu ĝuste en lia regiono havis fortan radikon.

Post fondiĝo de Blindulasocio de Kroatio, en kies fondkunveno la 16-an de junio 1946 ankaŭ li ĉeestis, li agadis kiel komisiito de la Asocio en la distrikto Daruvar preparante



fondon de blindulaj societoj en tiu regiono.

Al Zagrebo li revenis en 1947. Por mallonga tempo li posteniĝis en laborejo por produktado de brosoj kaj plektado de korboj, poste ankaŭ en kartonlaborejo de Blindula hejmo en Radnička-strato, kaj ekde la 15-a de aprilo 1948 li ricevis postenon kiel telefonisto en Ministerio de agrikulturo. Laborante, li finis vespergimnazion kaj Filozofian fakultaton en Zagrebo, akirinte diplomon pri historio en 1959. En 1960 li ekpostenis en Metiista blindullejnejo (=Skola učenika u privredi), kie li prelegis pri telefonteknikoj, kaj ekde 1963 ĝis la emeritiĝo en 1975 li prelegis historion kaj socisciencajn objektojn en Buroteknika mezlernejo por blinduloj en Zagrebo.

Esperanton, kies ideojn li tuj akceptis, Tomislav ellernis jam kiel 13-jarulo en Blindulinstituto, kaj ĝi restis lia plej granda amo ĝis la lasta vivmomento. Lia kunvivo kun Esperanto, kiel li mem diris al mi en intervjuo por “*Jubileo Espero*” pasintjare, komenciĝis en 1938, kiam en “*Esperanta Ligilo*” aperis lia korespondanonco. Li korespondis kun multaj, tiam konataj blindaj esperantistoj, ekz.: Harald Thilander, Merrick, Kasin kaj aliaj. En sia libro “*La dua vivo*”, pri Esperanto-movado kaj Esperanto li, inter alie, skribis: “*Esperanto-movado prezentas vivon kaj aktivecon kiuj vekas esperon pri pli bona*

estonteco. Donu Dio, ke la homoj prudentiĝu por ne lerni kaj paroli ses mil diversajn lingvojn, sed unu solan, facilan, belsonan mondlingvon kia estas Esperanto.”

Tomislav Karlović estis unu el la fondintoj de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj komence de 1971, kaj en la internacian Esperanto-movadon aktive li enpaŝis ekde 1974, fariĝinte prezidanto de KUNE kaj ĉeestanto de pluraj Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. En unu mandato li estis prezidanto kaj vicprezidanto de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj kaj akiris multajn amikojn en la mondo kaj disĉiplojn en Kroatio.

Dum deko da jaroj li redaktis la gazeton de KUNE (“*Espero*”), redaktis malpli ampleksan Esperanto-kroatan kaj kroata-Esperantan vortaron en brajlo kaj propagandis eldonaktivecon por blinduloj en la Internacia Lingvo.

En 2000 li estis elektita honora kaj ĝisviva prezidanto de KUNE. La 4-an de novembro 2006, en la 8-a jarkunveno, KUNE festis la 35-jariĝon de sia fondo kaj laboro. Partoprenis ankaŭ nia Tomislav, kiu en mallonga parolado al la partoprenintoj prezentis la historian evoluon de KUNE. Ĝi estis lia lasta publika parolado, okazinta ĝuste inter ni, esperantistoj, post preskaŭ 70-jara vivado kun Esperanto. La nevidantaj esperantistoj de Kroatio esprimas ali li grandan kaj meritan dankon.





Boris Di Costanzo

De maldekstre sidas Vjekoslav Morankić, Fiore Saganić, Alessandro Privilegi (la filo) kaj Nives Car-Privilegi.

## ESPERANTO - LA ĈEFA ŜATOKUPO DE MALNOVA SAMIDEANINO

*Josip Pleadin*

En la urbeto Mali Lošinj, kiu kuŝas sur adriatika insulo Lošinj en Kroatio, siajn tagojn, plene dediĉitajn al Esperanto, vivas Nives Car-Privilegi. Ŝi estas unu el la izolitaj esperantistoj, kiuj vivas en malgrandaj lokoj dise tra la mondo. Iliaj kontaktoj kun esperantistoj estas ĉefe leteraj, retaj aŭ telefonaj. Malfote ilin vizitas samideanoj el aliaj lokoj.

En la jaro de centjariĝo de Esperanto en Kroatio, Nives atingos sian 80-an naskiĝtagon. Ŝi esperantistiĝis en 1956 aŭtodidakte, kaj dudek jarojn poste ŝi kunfondis la lokan klubon, kiu nuntempe ne plu funkcias. Kun nostalgio ŝi rememoras la Cseh-metodan atestilon pri lingva kapableco, kiun ŝi akiris en la 61-a Itala kongreso de Esperanto en Padova (Italio). Ĝuste kiam ŝi restis ligita al rulseĝo (kiel rezulto de malboniĝinta sanstato kaj operacio), ŝi eĉ pli intense okupiĝas pri Esperanto. La ĉefa intereso, per kiu ŝi plenigas siajn longajn tagojn, estas legado de Esperanta literaturo. Pasintjare, la 26-an de novembro, ŝin vizitis delegacio de najbaraj esperantistoj: Vjekoslav Morankić (prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo), Boris Di Costanzo (ĉefdelegito de UEA por Kroatio) kaj Fiore Saganić (alia loka esperantisto). Per tiu vizito ili signis la 50-jaran jubileon de ŝia esperantisteco. Malgraŭ la tuttaga restado en rulseĝo, Nives ne malesperas. Ŝi estas tre konvinkita esperantisto, kiu ŝatas ricevi informojn pri aliaj samideanoj. Gratulante al ŝi la jubileon, kaj dezirante ŝian reŝaniĝon, ni invitas ankaŭ vin sendi al ŝi poŝtkarton al ŝi la jubileon (libron aŭ gazeton). Ŝi certe tre ĝojos. La poŝtaĵojn adresu al: **Nives Car-Privilegi, Studenac 19, HR-51550 Mali Lošinj, Kroatio.**

Kun gusto de Esperanta etoso


# Biena Njeguš

 Josip Pleadin



*La objekto de Njeguš prezentita sur Esperanta bildkarto.*

*La internaĵo: granda salono kun Esperanta biblioteko*

 *La fotoj pruntitaj el la repaĝo de Kroata Esperanto-Ligo*





*Sur la dekstraj fotoj:  
La pasintjara verkista aranĝo  
en Njeguš kun diverslandaj  
partoprenantoj*

 **Stanko Rukelj**

La tradicia domo (konstruita en 1848 kiel la lasta per la deviga servutula laboro), situanta meze de la bieno konata al esperantistoj sub la nomo Njeguš, apartenis iam al nobelaj familioj. En la jaro 1920 la domon aĉetis praavo de Spomenka Štimec.

Spomenka Štimec, heredinta la objekton (kiu havas 100 kvadratmetrojn da spaco) kaj la bienon de 12.000 kvadratmetroj, komencis rekonstrui la posedaĵon en 1991 kunlabore kun Regiona instituto por protekto de kulturmonumentoj.

La loko situas je 50-kilometra distanco de Zagrebo, en regiono de Zagorje. Pli precize, en la vilaĝo Hrašćina-Trgovišće. Ĝi estas facile atingebla trajne kaj aŭtomobile.

La bieno estas loko por amikiĝo kaj kleriĝo de landaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Tie tradicie okazas la konataj Renkontiĝoj de Esperantlingvaj verkistoj kaj aliaj aranĝoj kun kultura kaj literatura karaktero.

La domo posedas grandan salonon kun Esperanta biblioteko, tradician kuirejon, tri dormejojn, banejon, du necesejojn, vinkelon kaj telefonon.

Proksime troviĝas Termalbanejo Varaždinske toplice. Dum somere eblas tendumi, kaj en distanco de 30 kilometroj troviĝas ankaŭ hotelo (en urbo Varaždin).

La programoj kutime okazas en ombroriĉa prunarbejo.



## Filatela angulo



**Kroata poŝtmarko okaze de kvarcentjariĝo de Klasika gimnazio en Zagrebo**

Kroata poŝto okaze de kvarcentjariĝo de Klasika gimnazio en Zagrebo eldonis la 9-an de januaro ĉi-jare poŝtmarkon, kies motivo estas mafermita libro kun gravuritaj romiaj ciferoj CD (400). La poŝtmarkon desegnis Boris Ljubičić el Zagrebo. Ĝia grandeco estas

25,56x35,50 mm, ofseta multkolora preso, nominala valoro 5 kunaĵoj. Samtempe estas eldonita unuataĝa koverto.



# KIAN SORTON HAVIS LA KOLEKTO DE TIBOR SEKELJ?


*Josip Pleadin*

Antaŭ preskaŭ du jardekoj, la vicajn de esperantistoj forlasis unu el la plej famaj figuroj - la monde konata esploristo kaj verkisto Tibor Sekelj. Post lia forpaso, dum mallonga tempo vibris informoj pri li tra la esperantistaj medioj, kaj poste oni kvazaŭ forgesis pri tiu grandulo de la Movado. Sed, nur ŝajne ...

Laŭ la semajna gazeto "Subotiĉke novine" (n-ro 34, la 23-an de februaro 2007), ni ekscias, ke la esperantistoj daŭre restis ligitaj al lia nomo. En februaro la Esperanto-klubo "Tibor Sekelj" en Subotica, per omaĝa programo rememoris pri la 95-a datreveno de lia naskiĝo. En la programo, per okaza parolado, partoprenis ankaŭ la vidvino de Tibor, sinjorino Eržeбет Sekelj.

Al la ĵurnalistoj ŝi diris la veron pri la kolekto, kiu post la morto de ŝia edzo restis en ilia domo.

Tibor jam dumvive deziris la kolekton donaci al la urbaj instancoj de Subotica, tiu vojvodina urbo kie li pasigis multajn siajn jarojn, kaj kie li finfine ankaŭ mortis. En februaro 1991 la edzino subskribis kontrakton kun la urbestro de Subotica, per kiu la kolekto estis donacita al la urbo, sub kelkaj kondiĉoj. Unu el la kontraktaj ĉapitroj preskribis, ke la kolekto



estu publike ekspoziciita en konvena loko post paso de ne pli ol 5 jaroj. Tamen, la urbo Subotica ne plenumis tiun parton de la kontrakto ĝis la jaro 2003. Komplete senespera, la edzino reprenis la kolekton, kaj volis donaci ĝin al iu eksterlanda institucio, sed lastmomente ŝi ŝanĝis la opinion. Ŝi kontaktis kun la esperantistoj en vojvodina urbeto Senta, kiuj dum jaroj tre estimis la forpasintan Tibor, kaj eĉ postmorte regule metas florojn sur lian tombon. Per helpo de la esperantistoj, la urba muzeo en Senta akceptis la kolekton. Provizore estas ekspoziciataj nur ĝiaj partoj, sed oni faras ĉion eblan por trovi konvenan lokon por ekspozicii la tuton.

La kolekto konsistas el diversaj objektoj: ĉirkaŭ 3000 diapozitivaj, pasportoj, taglibroj, fotoj, magnetofonoj, fotiloj, ĉio kion Tibor uzis dum

siaj vojaĝoj. Al lia heredaĵo apartenas ankaŭ 27 eldonitaj libroj.

La rifuzo de la urbo Subotica akcepti kaj trovi konvenan lokon por la kolekto de sia urbano estas des pli tragika, ĉar Tibor mem venis al Subotica en 1972 por esti direktoro de la Urba muzeo.

Kiel diris la vidvino, Esperanto por Tibor estis aparta ĉapitro en la vivo. Tion la esperantistoj tutmonde tre bone scias, des pli tiuj kiuj konis la genian esperantiston, kuraĝan vojaĝanton kaj tre simpatian homon.

## UK-STATISTIKO

Ĝis la komenco de junio aliĝis al UK en Jokohamo 1700 personoj el 57 landoj. Inter tiuj troviĝas ankaŭ jenaj kroatoj: Marija Belošević (Zagrebo), Ivo Borovečki (Pula), Lucija Borčić (Zagrebo), Dalibor Brozović (Zagrebo), Davor Grgat (Split), Vida Jerman (Zagrebo), Gordana Katunar (Rijeka), Davor Klobučar (Osijek), Damir Malkoč (Osijek), Zlata Nanić (Zagrebo), Ivo Osibov (Split), Katja Osibov (Split), Tomislav Radić (Zagrebo), Ana Radulović (Rijeka), Spomenka Štimec (Zagrebo).

## IJK-STATISTIKO

Al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso okazonta en Vjetnamio, aliĝis du kroataj junaj geesperantistoj: Kaja Farszky kaj Zoran Vukas (ambaŭ el Zagrebo).

# ESPERANTO KIEL KULTURA PONTLINGVO EN KROATIO

Zlatko Tišljarić

Kroataj esperantistoj estas interesa fenomeno en la E-movada historio, ĉar nun ili sisteme uzas Esperanton kiel peran lingvon por diskonigi sian (sed ne nur sian) kulturon en aliaj naciaj lingvoj. Jam en la komenco de la E-movado en Kroatio oni komencis traduki gravajn kroatajn literaturaĵojn al Esperanto kaj en la tridekaj jaroj la novelo "Ano de l' Ringludo" estis retradukita al la ĉina, kiel la unua literaturaĵo entute disponigita el kroata literaturo sur la ĉina merkato. Sed ne nur literaturo estis perata per Esperanto. En la 50-aj jaroj Srđan Flego fondis en Zagrebo Internacian Artan Teatron (IAT) kiu dum pli ol unu jardeko estis la ĉefa profesia teatro kiu ludis teatraĵojn en Esperanto. Ili ludis tradukitajn verkojn el diversaj naciaj literaturoj inter kiuj pluraj estis tradukoj de kroataj dramverkistoj. Tiun tradicion daŭrigis ankoraŭ nun fama Vida Jerman. La literaturtraduka laboro neniam ĉesis kaj aparte elstaris dum aktiva

agado de Internacia Kultura Servo (IKS) inter 1970 kaj 1990 kiam aperis plurdeko da libroformaj tradukoj el la kroata literaturo. Inter ili kelkaj aperis en alianciaj retradukoj, aparte poeziaj verkoj. Kroatajn poeziaĵojn aperigis literatura revuo "Ponto" (Most) en pli ol 10 lingvoj kiuj estis tradukitaj al ili pere de E-versioj. En tiu periodo ekviglis ankaŭ pupteatra agado. Dum dudeko da jaroj en Pupteatra Internaciaj Festivaloj (PIF) en Zagrebo prezentigis ĉirkaŭ 150 diversaj spektakloj en Esperanto tradukitaj el diversaj eŭropaj lingvoj. Pluraj el ili poste estis retradukitaj kaj ludataj en aliaj naciaj lingvoj. Tiutempe eĉ pentroarto estis perata per Esperanto. IKS organizis ekspozicion de modernaj kroataj pentristoj en Udine en Italio kaj la katalogo aperis en Esperanto, la itala kaj la kroata lingvoj. Dum la lastaj du jardekoj denove floras literatura traduklaboro kaj retradukado al aliaj

naciaj lingvoj. La plej brilaj ekzemploj de uzado de Esperanto kiel pontlingvo estas pluraj retradukoj de du perloj de kroata infana literaturo. Temas pri fabeleca rakonto de Ivana Brlić-Mažuranić "Aventuroj de metilernanto Hlapić" kiu estis retradukita al pluraj aziaj lingvoj kiel la persa, ĉina, japana, vjetnama kaj bengala kaj la infana romano "Wakajtapu" de Joža Horvat retradukita al la ĉina. Tiu agado kutime havas grandan reehon en kroataj naciaj publikrimedoj, en la gazetaro, radioj kaj televido, ĉar ja malgranda popolo ĉiam pli fieras pri tiaj atingoj de sia kulturo. Tio siamaniere influas ankaŭ al pli facila gajno de ŝtataj subvencioj, kion inteligente scias eluzi la kroataj esperantistoj.

Ĉu ne imitinda ekzemplo - almenaŭ por esperantistoj en malpli grandaj landoj?

Laŭ "Eŭropa Bulteno" n-ro 4 (58), aprilo 2007

## ANKORAŬ UNU ESPERANTISTO - MILITVIKTIMO

Laŭ la "Biografia leksikono de kroataj esperantistoj", pri bona parolinto de Esperanto kaj aktiva esperantisto **ZLATKO BRAJER** el Borovo, ni sciis nur, ke li mortis. La historian malĝustajon ni apenaŭ nun reĝustigas. Li estis kroato, naskiĝinta la 3-an de julio 1939 en la konata kroata enklavo, vilaĝo Janjevo en Kosovo. Laŭ profesio - ekonomika teknikisto, laste laborinta en la firmao "Medika" en Borovo naselje (parto de Vukovar). El sia laborloko, li estis perforte forkondukita al serba koncentrejo Begejci, kie li estis mortigita la 3-an de decembro 1991. Aktive pri Esperanto li okupiĝis inter 1960 kaj 1985. Li estis membro de Esperanto-societo "Fratoj Ribar" en Borovo. La ĉi-supran funebran sciigon ni ricevis de lia vidvino Marija Brajer el Vukovar. Li aliĝas al aliaj viktimoj de la sensenca milito, pri kiuj "Tempo", la oficiala organo de KEL, skribis jam multe plu frue.



### REINHARD SELTEN PAROLIS EN EŬROPA PARLAMENTO

La 9-an de majo, en la Eŭropa tago, Eŭropa Unio solenis la kvindekjariĝon de la Roma traktato kaj invitis Nobel-premiitojn paroli en la Eŭropa Parlamento. Inter la invititoj troviĝis ankaŭ la germana esperantisto Reinhard Selten, kiu ricevis Nobel-premion por ekonomiko en 1994. En sia parlamenta parolado li argumentis por la bezono de plia ekonomia integriĝo kaj fortigo de la eŭropa identeco. Ĉefa malhelpo por komuna eŭropa identeco, laŭ li, estas la lingva baro, kiun oni povus malaltigi per lernado de Esperanto kiel la unua fremda lingvo. Tiun informon la unua lanĉis "Libera Folio", kiu ricevis de la gazetara servo de la Eŭropa Parlamento la sonregistraĵon de la parolado de Reinhard Selten.

### SÉGOLÈNE ROYAL PROMESIS ESPLORI ESPERANTON, SED MALGAJNIS

Antaŭ la decida dua voĉdonado en la elekto de la franca prezidento, la kandidatino Ségolène Royal, sekvante la ekzemplon de la ĝistiama prezidento Jacques Chirac, respondis al la letero de franca esperantisto kaj promesis esplori sur la plej alta nivelo la demandon pri enkonduko de

Esperanto en la oficiala eduk-sistemo de Francio. Jam en 2002 Chirac dum la elekta kampanjo promesis sian subtenon al Esperanto. Preskaŭ same reagis lia antaŭulo François Mitterrand en 1981. Ĉar Ségolène Royal malgajnis en la prezidenta vetkurado, ni ne povas scii, ĉu ankaŭ ŝiaj vortoj restus "morta surpapera vorto", se ŝi estus elektita por prezidento de Francio. En la elektoj gajnis la dekstrula kandidato Nicolas Sarkozy, kiu ekoficis la 16-an de majo.



### BERTRAND HUGON REPREZENTIS UEA SEN RAJTIGO

Tri tagojn antaŭ la elekto de la franca prezidento (la 3-an de majo), reprezentantoj de tri esperantistaj organizaĵoj vizitis la stabon de la dekstrula kandidato Nicolas Sarkozy, kaj renkontiĝis kun Patrick Dechin, reprezentanto de la stabo. Unu el la vizitintoj, Bertrand Hugon anoncis, ke li reprezentas Universalan Esperanto-Asocion, dum la aliaj du estis Didier Janot nome de Unuiĝo Franca Esperantista kaj Jean Paul Tonnieau nome de la regiona organizaĵo Esperanto Loiret. La interparolo traktis la gravecon de lingva diverseco kaj la Eŭropan Ĉarton de la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, la Raporton Grin, kaj proponon enkonduki Esperanton en la francan abiturientigan ekzamenon. La reprezentanto de Nicolas Sarkozy klarigis, ke li nenion



povas promesi al la esperantistoj. Post kiam la raporto pri la vizito aperis publike, Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA, nome de la organizaĵo, komentis la okazintaĵon. Ŝi atentigis, ke s-ro Bertrand Hugon ricevis nenian rajtigon de UEA por reprezenti la organizaĵon en politika kunteksto, kio estas mem komprenebla afero pro la politike neŭtrala sinteno de UEA. Malgraŭ la nelegaleco de la ago de s-ro Hugon, la vicprezidantino aldonis, ke ne okazis granda malutilo. El tio sekvas la konkludo, ke la reputacio de UEA ne estis malpurigita.

### 2008 - INTERNACIA JARO DE LINGVOJ

Laŭ deklaro de Unuiĝintaj Nacioj, la jaro 2008 estas proklamita jaro de lingvoj. Laŭ gazetara komuniko de Unuiĝintaj Nacioj, temas ĉefe pri la egaleca traktado de la ses oficialaj lingvoj de la monda organizaĵo, kaj ke interalie, prioritare estu tradukataj ĉiuj gravaj dokumentoj al tiuj lingvoj. Tamen la komuniko akcentis ankaŭ la gravecon provizi teknikan helpon kaj edukadon en la lokaj lingvoj de la helpataj landoj.



## BORIS KOLKER GVIDOS LA AKADEMIAN KONSULTEJON

La Akademio de Esperanto ĵus reorganizis sian konsultejon. Ĝis la elekto de nova direktoro, provizore ĝin prizorgos Boris Kolker, anstataŭinte la pli fruajn prizorgantojn Stefan Maul. La Konsultejo de la Akademio estis starigita en 1999, kaj ĝia celo estas servi al Esperanto-uzantoj, kiuj turnos sin al tiu institucio per difinitaj lingvaj demandoj. La respondoj de la Konsultejo ne havas forton de decidoj de la Akademio, sed ili estas nur rekomendaj. Tamen, la Konsultejo petas, ke oni ne sendu simplajn demandojn, "kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto, serĉante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj".



## BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La plej grava Esperanto-evento en Brazilo, la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazos de la 8-a ĝis la 13-a de julio ĉi-jare en Rio de Janeiro. La kongresa temo estas "Cent jaroj de Esperanto-movado en Brazilo: strategioj por la estonto". Atendataj estas pli ol 1000 kongresanoj, per kio ĝi fariĝas verŝajne unu el la plej grandaj landaj eventoj en Esperantujo. Preparataj estas ankaŭ multaj prelegoj, artaj kaj kulturaj programoj, ekspozicioj, konkursoj, koncertoj ktp. La kongreson aŭspicias Brazila Esperanto-Ligo kaj organizas Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro.

## SOMERA MEZEŬROPA RENKONTIĜO

La 5-a SOMERE (Somera Mezeŭropa Renkontiĝo) okazos de la 13-a ĝis la 28-a de julio en Jünkerath (Eifel), Germanio. La celo: sperti internacian Esperanto-etoson, pasigi agrablajn feriojn, praktiki Esperanton aŭ eklerni la lingvon. Kontaktadreso: [somere5@esperantoland.org](mailto:somere5@esperantoland.org).



## "LA MASTRO DE L' RINGOJ" REAPEROS

Kiam aperis la unua eldono de tiu fama libro de Tolkien en la traduko de William Auld, estis certe ke ĝi estos furoraĵo en nia libromarketo. Post ĝia rapida elĉerpiĝo, ĉefe dank' al la prunto de la fondaĵo FAME, ĉi-jare aperos la dua, korektita eldono. Zorga kontrolado forigis erarojn de la unua eldono, kaj la libro aperos sub marko de "Sezonoj". Ĝi estos presita en Litovio, kaj la kovrilpaĝojn aranĝis la kaŭna libroartisto Vladimiras Beresinovas. La oficiala prezento de la dua eldono okazos en BET-43 en Šiauliai, kaj la projekto-gvidanato, Aleksander Korjenkov, poste prezentos ĝin en tri aliaj gravaj movadaj aranĝoj ĉi-jaraj: "Arta Lumo" en Finnlando dum julio, "Sukcena Ondo" en Kaliningrado en aŭgusto kaj en "Arkones" en Poznano dum septembro. En ĉiuj nomitaj aranĝoj la libro estos acetebbla kontraŭ rabatita prezo.

## "SUKCENA ONDO" EN KALININGRADO

De la 17-a ĝis la 19-a de aŭgusto 2007 en Kaliningrado okazos, organizota de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo

(KREU) kaj la redakcio de "La Ondo de Esperanto", la festa renkontiĝo titolita "Sukcena Ondo 2007", dediĉita al la 100-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en Kenigsbergo-Kaliningrado. La festkunveno okazos en la prestiĝa Germana-Rusa Domo la 17-an de aŭgusto. Informiĝu ĉe: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net).



## LITRATURA KONKURSO "LIRO-2007"

"La Ondo de Esperanto" denove invitas la verkistojn kaj tradukistojn partopreni en la tradicia literatura konkurso "LiRO". Ĝi okazos en kvin branĉoj: 1) Originala prozo, 2) Originala poezio, 3) Traduka poezio (poemoj de Saša Ĉjornyj), 4) Traduka prozo (el la rusa: "Аптекарьша" de A. Ĉehov) kaj traduka prozo (el la angla: "Eveline" de James Joyce). En la branĉoj 1-3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. La verkojn oni devas sendi en kvar tajpitaĵ, komputile kompostitaj aŭ klare skribitaj ekzempleroj al: **Halina Gorecka, RŬ-236039 Kaliningrad, abon. jaŝĉik 1205, Ruslando** antaŭ la 15-a de oktobro. La verkoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo kun aldonita slipo kiu indikas la pseŭdonimon, aŭtentan nomon kaj poŝtan adreson.

## INTERNACIA KONFERENCIO EN MOSKVO

La 13-an de aprilo 2007 en Moskvo okazis internacia konferenco "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj", kiun partoprenis 48 prelegantoj el 7 landoj kaj 4 korespondantoj, el kiuj 27 profesoroj kaj 3 docentoj. La unua provo diskuti pri tiu temo

estis farita en 2005, kiam Rusia Esperantista Unio turnis sin al la Rusia Klerigministerio kun la propono enkonduki Esperanton en universitatajn studplanojn kiel propedeŭtikan rimedon antaŭ la studado de fremdaj lingvoj. La propono estis rifuzita. La dua provo okazis la 20-an de decembro 2006, kiam la Universitato Justo kaj Rusia Esperantista Unio starigis antaŭ la Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco la problemon pri enkonduko de Esperanto en studplanojn de rusiaj mezaj kaj superaj lernejoj. Meze de januaro 2007 la rektoro de Justo renkontiĝis kun Nelli Rozina, vic-direktorino de la Departemento pri ŝtata politiko kaj normig-jura reguliro en klerigo de la ministerio. La ministerio fine konsentis pri la propono organizi priesperantan konferencon. La Konferenco proponis rezolucion, kiu estis transdonita la 24-an de aprilo al la oficejoj de la Ministro Andrej A. Fursenko kaj de la direktoro de la Departemento pri ŝtata politiko en klerigo ĉe Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de la Rusia Federacio Isaak I. Kalina.

### **INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO EN JOKOHAMO**

Kunordigita de profesoro Christer Kiselman, la Komisiono pri IKU elektis naŭ prelegojn por Internacia Kongresa Universitato en Jokohamo: "La Vortaro por Lernantoj" (Gotoo Hitosi), "Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj?" (Kimura Goruo), "Kapitalismo kaj Konfuceca kulturo" (Lee Chong-Yeong), "Orienta-okcidenta dialogo laŭ Heidegger" (Eugen Macko), "Geografia Informo-Sistemo (GIS) en nia vivo" (Sibayama Zyuniti), "Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj" (José Antonio Vergara), "Orienta astronomio: gastejoj en la Galaksia fervojo" (Amri Wandel), "Esperanto kaj Bakin" (Zhu En) kaj "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto"

(Yamasaki Seiko). La resumoj de la prelegoj estas jam legeblaj en la reto: <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

### **METEORITA FESTO**

La 26-an de majo ĉi-jare, en la bieno Njeguŝ en Hraščina, per aparta programo estis omaĝita datreveno de falo de meteorito. La festo havis formon de literatura vespero, kies gasto estis verkisto Igor Mandić. Prezidanto de Kroata Verkista Societo

Velimir Visković parolis pri la aktuale aperinta reeldono de lia libro "Zbogom, dragi Krleža" (Adiaŭ, kara Krleža). La verkisto mem parolis pri siaj renkontiĝoj kaj restadoj kun Miroslav Krleža, fama kroata verkisto. Li menciis ankaŭ sian libron de taglibraj notoj "Sebi pod kožu" (Sub sian haŭton), kiu vendiĝis en pli ol 10.000 ekzempleroj. La ĉi-jaran "Meteoritan feston" organizis Kroata Esperanto-Ligo okaze de la 256-a datreveno post falo de

**Esperanto-Asocio de Finnlando**  
1907–2007  
invitas al festivalo  
**Arta Lumo**  
Kuopio Finnlando  
27.7-1.8.2007

Por aŭtomate ricevi aktualajn informojn:  
sendu vian retadreson al [ArtaLumo@esperanto.fi](mailto:ArtaLumo@esperanto.fi)  
aŭ vian adreson al EAF/Arta Lumo,  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki  
[www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi)



la meteorito en la apuda vilaĝo Domovec, la 26-an de majo 1751. La meteorito, kiel eksponaĵo, troviĝas en Vieno.

### TEJO-PREZIDANTO EN VJETNAMIO

La prezidanto de TEJO David-Emil Wickström, en majo vizitis Vjetnamion, kie li renkontiĝis kun la LKK de la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso. Du televidkanaloj intervjuis lin dumvizite. Li renkontiĝis ankaŭ kun reprezentantoj de la oficiala Vjetnama Unio de Amikecaj Organizaĵoj. La prezidanto de tiu organizaĵo Vu Xuan Hong (cetero membro de la vjetnama parlamento) ĉeestis ankaŭ la lastan kunsidon de la LKK. Dum la vizito de Wickström al la Universitato de Hanojo, okazis ceremonio kun disdono de diplomoj al 37 studentoj, kiuj faris bazan ekzamenon de Esperanto. La prezidanto de TEJO inspektis ankaŭ la studentan gastejon kie loĝas la IJK-anoj.

### MALFERMA TAGO EN LA CENTRA OFICEJO DE UEA

La 2-an de junio (sabaton), la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo estis vizitita de pli ol 90 personoj el 15 landoj okaze de la 26-an fojon okazinta "Malferma tago". La ĉefa gasto estis Claude Piron kun la prelego "Ĉiuj neesperantistoj estas afaziuloj". Lucas Vignoli Reis, reprezentanto de Brazila Esperantista Junularo prelegis bildo kaj sone pri sia lando. Yves Nevelsteen kaj Petro Balasz prezentis la retan enciklopedion Vikipedio kaj la ĉeestintoj poste povis sekvi praktikan demonstradon kaj kunredaktadon de ĝi. Tuttage estis projekciitaj ankaŭ Esperanto-filmoj. Surpriza programero estis la flamenka versio de "La Espero" prezentita de Solo. Bone funkciis ankaŭ la Libroservo, kiu enkasigis 2054 eŭrojn.

### FRANCOJ KONGRESIS KAJ ELEKTIS

Pli ol 160 homoj kolektiĝis en la

franca nacia kongreso en Bourgen-Bresse fine de majo. Okazis prelego de Rodica Todor pri Rumanio, inaŭguro de Arbo de Paco, koncerto de kataluna ensemble "Kaj Tiel Plu", epika koncerto de Martin Wiese. Okazis ankaŭ komitatkunsidoj kaj ĝenerala asembleo de la landa asocio Esperanto-France kaj pluraj laborgrupoj. La nova prezidanto de UFE estas Bruno Flochon, ĝenerala sekretario Aleks Kadar.

### NOVAĴOJ EL GERMANIO

La ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso okazis de la 25-a ĝis la 28-a de majo en Hamburgo, kun partopreno de 172 personoj. Seán Ó Riáin prelegis pri "Esperanto kiel ŝanco por la Eŭropa Unio". Concertis "Kajto". Prezentigis la plej ampleksa dulingva vortaro "Granda Vortaro Germana-Esperanta" de Erich-Dieter Krause, kiu aperis la 21-an de majo en la eldonejo Helmut Buske en Hamburgo. Ĝi ampleksas 1679 paĝoj kaj pli ol 160.000 kapvortojn kaj parolturnojn. La nova estraro de GEA estis elektita la 27-an de majo: Rudolf Fischer (prezidanto), Andreas Emmerich (vicprezidanto), Pit Hauge (kasisto) kaj estraranoj Wolfgang Bohr, Andreas Diemel, Jörg Gersonde, Sebastian Kirf, Christof Krick kaj Rainer Kurz.

### SCIENCA KONFERENCO EN LITOVIO

La 18-an kaj 19-an de majo en Kaŭno (Litovio) okazis FIHUSO (internacia interfaka scienca konferenco), kiun partoprenis fakuloj pri fiziko, humanismaj kaj sociaj sciencoj. Organizita de Kaŭna humanisma fakultato de Vilna Universitato, ĝi altiris 204 personojn el 33 landoj, inter kiuj esperantistoj havis grandan rolon. En la scienca komitato eniris ses famaj esperantistoj: Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Geraldo Mattos, Balázs Wacha, Wim Jansen kaj Aleksandr Duliĉenko. Partoprenis la konferencon 21 esperantistoj el

16 landoj. La honora prezidanto de la scienca komitato estis Reinhard Selten kaj inter la ĉefparolantoj en la plenkunsido estis kvin esperantistoj. Estas eldonita 180-paĝa konferenca libro.

### RUSIA INVITIS UNIVERSALAN KONGRESON POR 2009, SED...

Rusia Esperanto-Unio (REU) dum sia kongreso en Tihvin komence de marto decidis inviti Universalan Kongreson al Rusio. La invito validas ankaŭ por postaj jaroj, se ĝi ne povos okazi en 2009. Diskoniĝis la entuziasma subteno de la Moskva urba registaro al la propono. Post la diskonigo de tiu informo, la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller diris, ke praktike estas jam tro malfrue fari inviton por la jaro 2009. Estas konata la fakto, ke preskaŭ certe tiujare UK okazos en Pollando, pri kio decidis la UEA-estraro meze de aprilo en Roterdamo. Tiu decido forte kolerigis kelkajn gvidantojn de REU, kiuj argumentis, ke la estraro promesis ne fari la decidon antaŭ la UK en Jokohamo. Laŭ vortoj de Nikolao Gudskov, vicprezidanto de REU, tia traktado de la afero kaŭzis krizon en REU. REU sendis al Renato Corsetti kritikan leteron, kiun pro ĝia akreco rifuzis subskribi Andrej Grigorjevskij, la prezidanto de la asocio. Anstataŭe subskribis ĝin Nikolaj Gudskov. En la diskutejo de REU, ricevis subtenon la ideo aranĝi internacian Esperanto-kongreson en Moskvo sendepende de UEA, se UEA ne plu montrus interesigon pri la proponoj de REU. La akra disputado tamen kvietiĝis fine de majo, kiam venis pliaj klarigoj de UEA, kiu pretas diskuti pri la ebleco aranĝi Universalan Kongreson en Moskvo en posta jaro.

### ĈU BARBARA PIETRZAK FARIGOS ĜENERALA SEKRETARIO DE UEA?

En la konkluda raporto de la elekta komisiono de UEA, sendita

perpoŝte al la komitatanoj, la komisiono rekomendas, ke Barbara Pietrzak estu elektita kiel ĝenerala sekretario de UEA. Konante la karakteron de tiu vigla kaj aktiva esperantistino, kiu estas la ĉefa protagonisto de Esperanto-elsendoj de Pola radio, la elekto ŝajnas tute natura kaj preskaŭ certa.

### "KONTAKTO" HAVAS NOVAN REDAKTORON

La estraroj de TEJO kaj UEA komune decidis pri la nova redaktoro de "Kontakto", la socikultura revuo de TEJO. Li estas Pavel N. Mojajev el Ukrainio, kaj li transprenos tiun taskon de Ĵenja Amis, kiu sindediĉe kaj kun plena sukceso redaktis la revuon ekde 2002. La nova redaktoro naskiĝis en 1981, diplomiĝis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina Universitato en Simferopolo, kie li nun instruas pri anatomio. Esperantisto ekde 2000, aktiva movadano landnivele. Ekde la jaro 2003 li estis provleganto de "Kontakto" kaj ekde 2006 vicredaktoro. Li estas ankaŭ sperta muzikisto kaj Cseh-metoda instruisto. Li ankaŭ verkas kaj tradukas, kaj lastatempe okupiĝas pri kompilado de Esperanta-rusa vortaro.

### INTERNACIA FLUG-KARAVANO AL 92-A UK KAJ 40-A ILEI-KONFERENCO EN JAPANIO -

**2-a ĝis 19-a de aŭgusto 2007**  
Al la internacia flugkaravano de Orbis Pictus de Viŝnja Branković, kiu startos el Italio la 2-an de aŭgusto 2007, ĝis nun aliĝis esperantistoj el 8 landoj (devenantaj de 4 kontinentoj), tre kvalita grupo de aktivuloj, instruistoj, akademianoj, premiitaj junuloj, veteranoj, komencantoj. La oferto estas fleksebla kaj proponas kvalitajn servojn de japanaj kaj italaj liveristoj. La prezo de la "baza kongresa pako" junie estis 1557 eŭroj (+ aerhavenaj impostoj). La aliĝo al UK aŭ / kaj ILEI estas rekomendita, sed ne "deviga".

Ankaŭ neesperantistaj familianoj kaj amikoj aliĝas samkondiĉe al la karavano. Ĝis la komenco de junio al UK en Jokohamo aliĝis pli ol 1700 kongresanoj el 57 landoj kaj la aliĝado ankoraŭ marŝas. Lastmomentuloj ankoraŭ povas interesiĝi pri la disponeblo

kaj la prezo ĉe:

**ORBIS PICTUS**  
**de Viŝnja Branković**  
**Via Parini 5, IT-34 129 Trieste**  
**tel/fax: +39 / 040 767 875**  
**orbispictus@iol.it**  
**visnja.brankovic@os.t-com.hr**



### VIZITO AL SENLACA SAMIDEANO

*Josip Pleadin*

En Hejmo por emerituloj en Vinkovci, de antaŭ unu jaro loĝas **ALEKSJIJE HERIĆ**, malnova esperantisto, kiu aktivis en Esperanto-

societo "Fratoj Ribar" en Borovo. Tuj ĉe la unua vizito videblas, ke lia entuziasmo pri Esperanto estas same intensa kiel antaŭe. Dum nia vizito la 4-an de junio ni informiĝis, ke li gvidas Esperanto-kurson por kvin aliaj loĝantoj en la Hejmo.

Kiam mi salutis lin en la kroata, li demandis min en perfekta Esperanto: "Kial vi ne parolas Esperante?". La resto de la interparolo estis Esperantlingva. Li malofte havas eblecon praktiki la lingvon parole, kaj ĉiun tian okazon li eluzas senevite.

Kun intereso nia samideano trafolumis ankaŭ la unuan numeron de nia gazeto.

Li bedaŭras, ke li ne povas vizitadi malnovajn amikojn kiel antaŭe, sed aliflanke, ke malmultaj vizitas lin. Se pro ia laboro vi venas en ĉi-tiun slavonian urbon, la pordo de lia ĉambro estas malfermita por ĉiu bonintenca samideano, kun kiu li volonte pasigus tempon en interparolo.

### LA 18-a MKR SURINSULE

La 18-a MKR, tradica rekontiĝo por Esperanto-naturemuloj, ne gvidos la partoprenantojn ĉi-jare al altaj alpaj pintoj aŭ al verdaj riveraj valoj, sed al ŝtonaj karstaj montetoj kaj blua kaj varma Adriatika maro! Ĝi estos la unua organizita sur insulo kaj la unua el kies ejo oni povas promeni ĝis plaĝo!

La 18-a MKR okazos inter la 27-a kaj 30-a de septembro en vilaĝo Beli sur la nordadriatika insulo Cres (Kroatio). La insulo Cres estas la plej granda adriatika insulo, sed ankaŭ unu el plej malmulte tuŝitaj per amasa turismo. La vilaĝo Beli estas la plej malnova loĝata loko en la insulo kaj ankaŭ unu el la plej malnovaj en tuta Kroatio. Ĝi estas loĝata ekde iliraj tempoj kaj dum romiaj tempoj ĝi estis grava gardista punkto. Kvankam Beli nun havas nur ĉirkaŭ 20 tutjarajn loĝantojn en siaj 100 domoj, ĝi estas vaste konata kiel centro de naturprotektado kaj ekologia turismo. Unu el la plej konataj tiaspecaj societoj, "Caput Insulae" havas sidejon nur 50 metrojn for de la ĉi-jara MKR-ejo.

#### La ejo

Ĉi-jare la MKR-ejo estos pensio "Tramontana", kiu gastigos nin pli lukse ol estis kutimo dum antaŭaj MKR-oj. La partoprenantoj





loĝos en 2-4-litaj ĉambroj, el kiuj pluraj havas proprajn necesejon kaj duŝejon. La ejo troviĝas en malnova domo kiun la posedantoj renovigis, tenante samtempe etoson de pasintaj tempoj - de malnova boato en trinkejo ĝis azenoj kiuj loĝas en ilia ĝardeno. La domo troviĝas 300 metrojn for de la historia kerno de Beli kaj 15 promenminutojn de la loka plaĝo (ne forgesu bankostumon, ĉar fine de septembro naĝado verŝajne estos ankoraŭ agrabla!).

### Ekskursoj

La ĉi-jaraj ekskursoj ofertas al vi denove plurhorajn migradojn kaj promenojn kun sekvaj interesajoj:

- neforgesebla veturado al Beli laŭ mallarĝa strato 300 metrojn super la marnivelo, kun rigardoj al najbaraj insuloj

- konata vilaĝo Lubenice kun unu el la plej belaj adriatikaj plaĝoj kaj markaverno

- forlasitaj vilaĝetoj de Cres

- marĉo Kosmačev, la plej granda sur la insulo, kiu estas fonto de akvo por lokaj ŝafoj kaj por arbaraj bestoj (sur la tuta insulo ne troveblas fluanta akvo, sed lago *Vransko jezero* estas la plej granda lago de adriatikaj insuloj)

- eta kanjono kun malgranda ponto el romiaj tempoj (nur 5 minutoj for de MKR-ejo!)

- skulptaĵoj kaj labirinto apud ekologi-instruaj vojetoj en ĉirkaŭaĵo de Beli

Pli da informoj pri la 18-a MKR kun pluraj fotoj de Beli, la ejo, utilaj retligoj kaj la aliĝilo troveblas je <http://www.keja.hr/mkr-n.html>

## AMANTOJ DE JUDAJ HUMURAĴOJ

La dissendogrupo [judahumuro@rido.net.il](mailto:judahumuro@rido.net.il), kiun iniciatis kaj gvidas Jozefo Šemer el Israelo en majo dissendis la 200-an ŝercon. La ŝercoj estas dissendataj al proksimume 130 adresoj. Se vi volas kunridi, aliĝu al la grupo. Jen specimenaj ŝercoj.

### Vagonarnecesejaj travivaĵoj

Tri judoj kaj tri gojoj staras en la kasa vico ĉe la vagonara stacidomo de Lvovo. Ili ĉiuj veturas al la foiro de Odeso. La tri gojoj aĉetis po unu bileton. Ili rimarkis, ke la tri judoj aĉetis nur unu bileton.

Gojo: "Kiel vi intencas veturi triope per unusola bileto?"

Judo: "Atendu kaj vi vidosis!"

Post la entrajniĝo la gojoj sidiĝis ĉe la unua kupeo dum la tri judoj tuj eniris la necesejon, fermante la pordon. Post dek minutoj aperas la konduktoro kaj kolektas la biletojn. Li batas la pordon de la necesejo kaj diras: "Bileton, bonvolu!". Tiam la pordo malfermiĝetas kaj mano ekaperas, tenanta bileton. La uniformulo prenas la bileton, dankas kaj pluiras.

La ideo plaĉis al la gojoj kaj ili decidis fari la samon kiam ili revenos al Lvovo, por ŝpari monon.

Post la foirumado renkontiĝis denove la du grupoj en la stacidomo de Odeso. La gojoj aĉetis unu bileton por iri al Lvovo. Sed je ilia granda miro ili atentis, ke la judoj aĉetis neniu bileton.

Gojo: "Kiamaniere vi veturos sen bileto?"

Judo: "Atendu kaj vi vidosis!"

Tuj post la entrajniĝo la tri gojoj eniris la plej proksiman necesejon. Tuj poste la tri judoj eniris apudan necesejon. Kelkajn minutojn post la ekveturo eliris unu judo el la necesejo, paŝis al la alia necesejo, batis la pordon kaj diras: "Bileton, bonvolu!"

### Se vi estas kontenta, venu denove.

Malgaje plendis Kohen al sia najbaro:

"Mi estas vera malfeliĉulo! Mia vendejo estis jam trifoje elŝtelita de iu rabisto, kaj verŝajne temas pri la sama ŝtelisto."

"Ne miregu, amiko", respondis la najbaro. "Vi ja havas en via montrofenestro surskribon: Se vi estas kontenta, venu denove. Do, akuzu nur vin mem!"



 Radenko Milošević



La sesopa teamo el MIT kun sia gvidanto d-ro Soljačić (sidanta meze)


La juna fizikisto Marin Soljačić (32-jara) estas gvidanto de la teamo el "Massachusetts Institute of Technology" (MIT), kiu la 5-an de junio prezentis en San Francisco ĉe "Forumo pri fiziko" koncepton de "Sendrata neradioaktiva transmision de energio". Pri la koncepto la unuan fojon informis la anglalingva revuo "Science", kaj poste dekoj da televidoj kaj gazetoj mondvasse.

La sesopa MIT-teamo kun Marin Soljačić estis anoncinta antaŭ ses monatoj la teorion eblecon de sendrata transmision de energio kaj nun ili sukcese realigis ĝin. Klariginte la sukceson li akcentis, ke la ideon havis Nikola Tesla, sed pro manko da mono li ne sukcesis finkonstrui la 29-metran turon sur Long Island. S-ro Soljačić kaj liaj kolegoj por sendrata transmision de energio uzis la scion pri fizika fenomeno de resonanco. Nome, ili uzis la fizikan fenomenon ĉe kiu objekto komencas vibri se oni simulas frekvencon de ĝia propra vibrado. Efektive ĝi estas aplikado de akustika fenomeno de muzikiloj, sed ili uzis la elektromagnetajn ondojn. Ekzemplo pruvebla: kiam soldatoj marŝas trans ponto, pro resonado la ponto povas komenci vibri.

La solvo de MIT-teamo estis la jena: inter du indukto-spiraloj, situantaj je dumetra distanco, ili sukcesis realigi transmision de elektra energio per kiu ekbrilis la 60-vatta elektra lampo. Kompare, ni menciuj, ke por poŝtelefono oni bezonas 1 vaton kaj por portebla personkomputilo 30-40 vattojn por unuhora uzado.

## La ideoj de Nikola Tesla pluiras **FUNDAMENTA SUKCESO EN SENDRATA TRANSMISIO DE ENERGIO**

*Kroata fizikisto Marin Soljačić sukcesis solvi problemon de sendrata transmision de energio, kiun siatempe konceptis Nikola Tesla.*



### **KIEL FUNKCIAS LA SENDRATA TRANSMISIO DE ELEKTRA ENERGIO**

- 1) elektra kurento el distribua reto eniras kupran antenon
- 2) resonanta frekvenco de la anteno estas 10 MHz, kaj ĝi produktas elektromagnetajn ondojn
- 3) la energiaj "vostoj" trakuras spacon de 2 metroj
- 4) la kurenton "kolektas" anteno de personkomputilo kiu funkcias je sama frekvenco kaj tiel ŝargas la ilon
- 5) la neeluzitan energion de la komputilo kolektas la unua anteno

El la mallonga biografio de doktoro Marin Soljačić menciindas, ke li estis naskita en Zagrebo, en la jaro 1974. Tie li finis bazlernejon kaj matematikan gimnazion. Li finis du fakultatojn: fizikon kaj elektroteknikon ĉe MIT, kaj magistrigis kaj doktoriĝis (en 2000) ĉe Princeton-universitato. Reveninte al MIT li ricevis statuson de profesoro pri fiziko, ricevinte premiojn kiel malpli ol 35-jara sciencisto kaj kiel juna inventisto.

Li antaŭvidas, laŭ la propra aserto por Kroata televido rekte el Usono, signifan progreson kaj uzeblecon de la invento en sekvontaj kvin jaroj.







Tomo Blažeković  
(1911)



Mato Brčić-Kostić  
(1912)



Josip Vinković  
(1913)



Jerko Baković  
(1916)



Vinko Milinković  
(1917)



Ratimir Metz  
(1917)



Elfrida Koren  
(1919)



Sava Matetić-Lučić  
(1920)

## KIU ESTAS LA PLEJ AĜA KROATA ESPERANTISTO (2)

*Josip Pleadin*

Kiam ni anoncis la temon en la unua numero de "Zagreba Esperantisto", la afero ŝajnis komplika, sed rapide ni konstatis, ke en Kroatio vivas ankoraŭ multaj malnovaj esperantistoj, ĉefe tre meritaj movadanoj. Por la unua fojo ni elektis la plej aĝajn. La listo estos daŭrigota en sekvontaj numeroj de "Zagreba Esperantisto", sed ni notos nur tiujn, kiuj estas en aĝo de minimume 80 jaroj.

La unua aserto, ke Josip Vinković el Koprivnica povus esti la plej aĝa, montriĝis neĝusta. Tuj post la publikigo de la artikolo, mi rememoris pri la plejaĝulo, **Lajčo Lendvai** en Zagrebo (li naskiĝis en 1909), sed, bedaŭrinde, li forpasis en oktobro de pasinta jaro sen nia scio. Konfirmis la fakton lia filo.

El la veterana generacio vivas ankoraŭ **Tomo Blažeković** en vilaĝo Bregi

apud Koprivnica, kiu laŭ la hodiaŭ konstatato, estas la plej aĝa. Li naskiĝis en 1911 kaj estis membro de la vilaĝana Esperanto-klubo en Bregi inter la du mondmilitoj. Laste mi parolis telefon kun lia bofilino fine de majo, kiam ŝi konfirmis, ke li vivas, kaj estas en mezbona sanstato.

La unua post li laŭaĝe estas **Mato Brčić-Kostić** el Zagrebo, naskiĝinta en 1912, kaj nur post ili sekvas la jam menciita **Josip Vinković** naskiĝinta en 1913.

La nevo de **Jerko Baković** el Zagrebo konfirmis, ke ankaŭ tiu maljuna samideano ankoraŭ vivas. Li naskiĝis en 1916 en Bolivio, kaj estis membro de Esperanto-societo "Bude Borjan".

Nesufiĉe konata al ni estas **Vinko Milinković** el Rijeka, naskiĝinta en 1917, kiu, laŭ aserto de rijekaj esperantistoj vivas, kaj tiun konstaton konfirmas ankaŭ lia membreco en Kroata Esperanto-Ligo. Post li sekvas **Ratimir Metz** en Varaždin, kiu naskiĝis ankaŭ en 1917, kaj kiu estas patro de esperantistino Zdravka Metz-Fleury vivanta en Kanado en

Esperanta geedzeco kaj havanta du denaskajn infanojn. En Rijeka vivas **Anja Hurĉak** naskiĝinta en 1918, kies foton bedaŭrinde ni ĝis nun ne havas. Fine de majo mi telefone interparolis ankaŭ kun **Elfrida Koren**, kiu vivas en domo por emerituloj en Zagreb. Mi intencas baldaŭ viziti ŝin.

*Sava Matetiĉ-Lučić*, vivanta en

Zagreb, naskiĝis en 1920, sed apartenas al ankoraŭ tre aktivaj movadanoj. Ŝi regule vizitas klubkunvenojn, abonas gazetojn, kaj ŝi estas eĉ la unua abonanto de "Zagreba Esperantisto", paginta la abonon tuj post kiam ŝi trafoliumis la unuan numeron.

*(daŭrigota)*

## KION PREZENTAS LA FOTO?

*(Respondo al la demando en la unua numero de „Zagreba esperantisto“ sur la paĝo 6)*

La respondo certe estos surpriza por plimulto da esperantistoj. Nome, la foto prezentas **klepsidron!**

Menciante klepsidron, kutime oni pensas pri vitra ujo plenigita per sablo aŭ akvo, kiu havas mallarĝan kolsimilan parton proksimume en la mezo inter la supra kaj malsupra duonoj. Ĝi ofte simbolas pason de vivo.

Tamen, la prezentita foto montras klepsidron! Tia klepsidro, nomata ankaŭ "akvo-horoloĝo" aŭ "akvo-ŝtelisto", estis uzita kiel kuireja ilo. Ĝi estis iatempe bronza globo kun koleto kaj kelkaj truoj sube.

La antikva sciencisto kaj filozofo Empedoklo (495–435. a.K.), estis fondinto de t.n. „kvaliteca atomismo“ per kiu li supozis, ke ĉiuj materioj estas faritaj el kvar elementoj: fajro, tero, aero kaj akvo. Samtempe li enkondukis inter la elementojn esprimon de potenco: kunliga amo kaj disiga malamo.

Empedoklo faris eksperimenton per tia ilo. Li malkovris, ke se oni ŝtopas koleton, la akvo ne povas elflui tra truoj, kaj kiam la koleto estas neŝtopita, la akvo elfluas. Al li montriĝis ankaŭ, ke klepsidron oni ne povas pleniĝi per akvo kiam ĝi estas dronigita en akvon kun koleto ŝtopita. Li konkludis, ke en la ujo estas iu nevidebla materio kiu malpermesas al la akvo eniri, el kio li supozis, ke tio povas esti nur – aero! Laŭlegende Empedoklo estis tiel ĝoja, ke post tia malkovro, li saltis en la vulkanon Etna – kaj pereis!

## NOVA DEMANDO

**Kial la numero 7 estas aparte interesa kaj konsiderata magia numero?**

Vian respondon sendu al la redakcio. La plej trafa respondo estos premiita per Esperanto-libro.

## LASTAJ INFORMOJ

**FONDITA UPE** - La 30-an de junio en Zagreb estis fondita Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE). La fondkunvenon partoprenis 11 personoj.

**KUNSIDO DE KOMITATO POR 100-JARA JUBILEO** - En Zagreb la 30-an de junio okazis kunsido de komitato por preparo de la 100-jara jubileo de Esperanto en Kroatio. Estis diskutitaj planoj pri unuopaj programoj kaj ideoj.

**KUNSIDO DE LA ESTRARO DE KEL** - La 2-an de junio Kroata Esperanto-Ligo havis sian kunvenon kun ampleksa tagordo.

**KONCERTOS MIKAELO BRONŝTEJN** - Vesperon de rusaj kantoj okazigos Mikaelo Bronŝtejn la 21-an de julio je la 18h00 en Bieno Njeguŝ. Venu kaj ĝuu!



## Marko Petrović (1939-1999)

Esperantisto kun sendiskuta talento al poezio. Pacbatalanto, kiu verkis satirtonajn poemojn originalajn. La Esperanta publiko nesufiĉe konas lian verkaron pro la fakto, ke lia sola poemaro estas "Ilia tosto je nia kosto", aperinta en "Etlibra biblioteko" de la antaŭa Zagreba Esperanto-Ligo en 1990. Kun plena respondeco oni povas aserti, ke ĝuste tiu malgranda poemaro vartas lian talenton. En ĝi mankas la ĉi-suba poemo "La Deko Muzo".

### LA DEKA MUZO

Unue aperas la muzo Klioa,  
grava por mi same kiel olda Noa,  
sed ŝi la inspiron donis pri nenio,  
krom pri la pratempo de la historio.

La dua fratino Eŭterpa estas,  
ŝi en muzikarto lerte instrumentas,  
la tria fratino en kierarkio  
estas ja Talia. Laŭ vasta scio -  
ŝi estas la muzo de la komedio.

Jen - malkongrue al ĉi-procesio -  
lace paŝas muzo de la tragedio,  
kun la plormiemo, morna, ĉagrenplena,  
funebre vestita, trista Melpomena.

Ĉu por la kontrasto, ĉu pro junecpranco,  
ŝin danĉpaŝe sekvas fratino Terpsikora,  
ĉiam vigla, gaja, ĉiam bonhumora,  
senĉese dancema, muzo de la danco.

Muzo Urania, sur Olimpo dia,  
al la astronomoj honorkronon plektas,  
Urania kultas la astronomion  
kaj la eŭklidan prageometrion.

Kaj ŝin akompanas tri muzoj-fratinoj -  
al helena mondo tre karaj feinoj  
kiuj ofte venas en promen' triopa:  
Eratoa, Polimnia, fine Kaliopa.

Ili anatemas pseŭdopoetojn  
kiuj muŝe falas en iliajn retojn:  
- Skribu - diras muzoj - kantu kaj verkaĉu,  
ne ŝparu la vortojn, ne zorgu pri inko  
ĉar eterne restas espero, konvinko,  
ke post la jarmiloj gloron vi akiros -  
nur post civilizo - dum spirita krizo,  
kiam barbarpesto estos via festo  
kaj ĉielon kiam ne tenos Atlaso,  
nur tiam vi povos grunti sur Parnaso!

Polimnia estas muzo protektanta  
talenton por himna liriko belkanta,  
pri la erotika poezio flirta  
zorgas emocia muzo Eratoa,  
muzo la naŭa - Kaliopa virta -  
inspiras talenton por epos' heroo.

Ilia komuna panjo Mnemozina -  
je Panteongloro - diin' de l' memoro,  
forĝesis alnaski la dekan filinon -  
por la tradukistoj la protektantino!

Ĉu (preter la scio de l' diino Hera -  
jam fame konata pro ĵaluz' infera)  
el dia adulto kaj intriga ruzo,  
estas kaŝnaskita tradukista muzo?

Ĉu - laŭ olimpa intriga pretendo -  
ĉe Mnemozina Zeŭs' petolgastis,  
ĉu el la gedia volupta kresĉendo,  
la deka naskiĝis - muzo Metafrastis?





Korajn gratulojn pro belaspekta kaj interesa unua numero.

**Spomenka Štimec (Zagrebo)**

Gratulojn pro la gazeto! Bona kaj inspira!  
**Višnja Branković (Triesto, Italio)**

Antaŭ kelkaj tagoj mi bone ricevis vian tre belaspektan kaj riĉenhavan revuon. Koran dankon. Altestime via

**Bardhyl Selimi (Tirano, Albanio)**

Antaŭ du tagoj mi ricevis "ZAGREBA ESPERANTISTO"-n, kiu tre ĝojigis min. Aperigi tiel belaspektan kaj enhance interesan publikaĵon estas tre laŭdinda. Bone vi rimarkis, ke estas tempo skribi iom pri la aktivado de niaj "pioniroj", ĉar la Esperanto-movado en Kroatio ne komenciĝis en la jaro 1945! Amikajn salutojn kaj multe da sukceso!

**Milan Sudec (Zagrebo)**

Hieraŭ mi ricevis la unuan numeron de "Zagreba esperantisto". Dankon. Hodiaŭ matene mi enpagis la jarabonon por 2007. Elkore salutas,

**Zlatko Hinšt (Zagrebo)**

ZE mi ricevis kaj legis ĝis la lasta paĝo, brila! Gratulon.

**Nikola Rašić (Roterdamo, Nederlando)**

Mi dankas al vi pro la sendita unua numero de "Zagreba esperantisto". Por verdkorulo ĉiu esperantaĵo estas interesa. Sed, ĉu ne riproĉos Esperanto-klubo en Rijeka, Osijek, Split kaj en aliaj lokoj pro la vorto "zagreba"?

**Dinko Matković (Vrboska)**

Mi nun legis la tutan gazeton. La gazeto estas absolute belega kaj tre interesa! La artikolo pri la avo kaj la ĉevaloj multege kortuŝis min! Bonege skribita kaj kun profunda amo!  
**Birthe Lapenna (Kopenhago, Danlando)**

Traleĝinte la novlanĉitan revuon, mi taksas ĝin taŭga por daŭra ekzisto. La rakonto pri la avo kaj liaj ĉevaloj kortuŝe emociigis min, ĉar la samon ankaŭ mi spertis.

**Stanko Rukelj (Majerje)**

---

***En la rubriko "Nia lterkesto" ni volonte publikigos diskutojn pri la enhavo de nia gazeto, komentojn, korektojn kaj opiniojn. La redakcio retenas la rajton mallongigi la enhavon de la ricevita opinio.***

## **KVARCENT JAROJ DE KLASIKA GIMNAZIO EN ZAGREBO (1607 – 2007)**

Klasika gimnazio - *Collegium Zagrabense* - estas la plej malnova mezlernejo en Kroatio. Ĝin fondis "Kompanio de Jezuo" per helpo kaj subteno de banuso Ivan Drašković la 3-an de junio 1607. En la unua lernojaro estis enskribitaj 260 lernantoj. La lernoprogramo estis jezuita: "*Ratio atque institutio studiorum societatis Jesu*" (Esperantlingve: "Plano kaj programo de la studado de "Kompanio de Jezuo"). Apud klasikaj objektoj estis instruataj ankaŭ kristanaj moralaj principoj.

Ĉe la malfermo de la lernejo estis prezentita latinlingva dramo "*Actio comica*", en kiu

junaj aktoroj gloris la belecon de sia hejmlando Kroatio.

Post ĉesigo de la jezuita ordo en la jaro 1773, la gimnazio fariĝis ŝtata. Poste, apud la klasika, estis organizita ankaŭ reala gimnazio. Ili ambaŭ kunfandiĝis en 1948. Post la politikaj kaj sociaj perturboj konataj kiel "Kroatio printempo" (1977), kiam la komunisma reĝimo montris sian vizaĝon similan al la ĉina "kultura revolucio", la titolo "gimnazio" estis malpermesita, kaj la ĝistiamu Klasika gimnazio iĝis "Kleriga centro pri lingvoj". Malgraŭ la ŝanĝoj, la "Centro" daŭre tenis sian klasikan programon kun latina kaj greka lingvoj.

Post la proklamo de sendependeco kaj libereco de Kroatio en la jaro 1991, Klasika gimnazio denove fariĝis aŭtonoma kaj memstara mezlernejo. Dum la hejmdifenda milito (1991 – 1995) dum la bombado de Zagrebo la 2-an de majo 1995 estis kutima eduka tempo. Je la 10h30 tiutage, la konstruaĵo de la gimnazio estis trafita per misilo, sed dank' al Dio, la evento pasis sen homaj perdoj.



# MEGATRADE

Ŝ T O N K L I N I K O

“Megatrade” estas entrepreno fondita en 1993. Ĝi distribuas purigmaŝinojn, purigilojn kaj purigaĵojn kaj posedas propran purig-servon.

- Maŝinpurigado, polurado kaj protektado de marmoro kaj granito
- Lavado de fenestroj
- Altlaboroj
- Protektado kaj impregnado de ŝtono
- Lavado de ŝtonaj, vitraj kaj metalaj fasadoj
- Purigado kaj regula prizorgo de oficejoj, laborejoj kaj hejmoj
- Purigado post konstrulaboroj

Zagreb, Vučetićevo prilaz 5/1

Tel/fax: 01/664-6058

GSM 091/4321-123

[www.megatrade.com.hr](http://www.megatrade.com.hr)

[megatrade@megatrade.com.hr](mailto:megatrade@megatrade.com.hr)